

ESPERANTO




Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Kampanjo 2000
aprobata de la
Komitato**

**Daŭra ligo kun
Unesko instigas
al pli aktiva
partnereco**

**Itala UK radiis
novan energion**



UK atingis kvinan kontinenton

Enhavo

- 141 82-a Universala Kongreso, Adelajdo, 19-26 julio 1997:
Kongreso valora preter ciferoj
- 142 Solena inaŭguro: Kundividi kion ni alte estimas; Mesaĝoj
de Kofi A. Annan, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj,
kaj de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof
- 143 Komitato kaj Estraro: Malpedanta Komitato mastris sian tempon
- 144 Ekas Kampanjo 2000 al nova internacia lingva ordo
- 146 Eksteraj rilatoj: Unesko-UEA: operaciaj rilatoj (Osmo Buller)
- 146 Kulturo: Kleriĝi pri la kongresa kontinento (Fabrizio Pagliaroli);
Gaste ĉe aborigenoj
- 147 Fakaj asocioj: Historia SAT-kunsido (laŭ raporto de YAMASAKI Seikō)
- 148 Kongresa Temo: Dorna vojo al multkultureco (István Ertl)
Lingvistiko: Sen duelo (István Ertl)
- 149 "Kiam mi aŭdis 'La espero'..." (intervjuo kun Jaroslav Suchánek)
Internacia Kongresa Universitato: Spekto de homa kulturo
(Sándor Monostori)
- 150 "Mi ne celas nutri stereotipojn" (intervjuo kun Paul Williams)
Teatro: Du ekscitaj aspektoj (Daniel Kane); *Noemi*, kunkreata
- 151 Informado: "Optimisma lingvo"; Ago-Tago igu agi
- 152 Solena Fermo: Ni bezonas novan etoson (István Ertl)
- 153 Kongreseroj koncize
- 155 Laste aperis
- 156 Junularo: Assisi: ĉu nova perspektivo? (Francesco Amerio);
Tutmondeco kaj kotiza justo (laŭ raporto de Sjoerd Bosga)
- 157 Instruado: Esperanto, ĉu propedeŭtiko al multkultureco?
- 158 Fakaj asocioj: Fervojfaka fervoro terminara
Religio: Senlime, ĝis Pakistano (Trude Sinno); Venu al islamo
- 159 Loke – Persone
- 160 Anonceto; Oficiala Informilo

Vi trovos

raportaron pri Universala Kongreso "ekstersezona", ĉar aranĝita dum vintro de la suda terglobo-duono. Sed tia vintro, ja milda, ne povis frostigi la tradicie varman UK-etoson. La relativa malgrandeco de la kongresanaro eĉ fortigis la senton troviĝi en "rondo familia".

Malgranda kongreso, baldaŭa forgeso? Certe ne, ĉar fruktis rezultoj preter la modestaj proporcioj de la UK. Sekve, raportendas multo — tiom ke ni eĉ devas prokrasti kelkajn prikongresajn erojn, ekz. tiujn pri Belartaj Konkursoj kaj "Libroj de la jaro". Kompense, aperas raportoj pri kelkaj gravaj renkontiĝoj de la pasintaj monatoj (p. 156-159).

En junio ni aŭguris ĉi-rubrike favoran perspektivon por la rilatoj Unesko-UEA. De tiam Unesko reviziis la statuson de la organizaĵoj kunlaborantaj kun ĝi kaj religis siajn kontaktojn kun UEA en nova kategorio, "operaciaj rilatoj". Pri ties praktika signifo legu sur p. 146.

Dankon al Svetislav Kanački, farinto de la kongresaj fotoj ĉi-numeraj, krom tiuj kun alia aŭtorindiko.

La kovrilo: Kongresano Clay Magalhães kun fotiĝema koalao. (Foto: Francjo Veuthey)

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monato (escepte de aŭgusto).
Redaktofinato: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 61; USD 35; DEM 55; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anoncarifoj (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:     

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-652-4488 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ☎ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎ +31-50-3613763 [of]; ✉ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ☎ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.



Adelajdo ornamis sian ĉefstraton per Esperanto-flagoj.

Kongreso valora preter ciferoj

En la lastaj 50 jaroj nur tri Universalaj Kongresoj estis pli modestaj ol la 82-a UK en Adelajdo, kun siaj 1224 aliĝintoj el 57 landoj. Ĉu ni opinii kun YAMASAKI Seikō, japano, ke “la tutmondeco gurdita de eŭropanoj estas hipokrita litanio”, pro tio ke ne pli ol 496 esperantistoj el Eŭropo aliĝis al ĉi tiu kongreso fora kaj multekosta por ili? Efektive, la tri “plej grandaj nacioj” ĉi-UK-e — Aŭstralio, Ĉinio kaj Japanio — sendis kontingenton kune pli nombran ol la landoj de la Malnova Kontinento, en kiu ja loĝas du trionoj de la UEA-membraro.

Tamen, valoro de kongreso ne estas difinebla per unu cifero nuda kaj kruda. Ne laŭ ĝi juĝis unuopa kongresano, ne sole laŭ ĝi taksos movadaj kronikoj.

La ĉi-jara sperto de averaĝa kongres-vizitanto estis: pli trankvila UK ol kutime, kun malpli da kolizioj inter programeroj, malpli da vojperdigaj koridoroj en la okazejo, pli facila troveblo de serĉata konato aŭ konoto meze de pli supervidebla amaso. La milda, aŭtuneca vintro sud-hemisfera invitis ĉiun al agrablaj promenoj kaj ekskursoj en kaj ĉirkaŭ la ĉefurbo de la ŝtato Sud-Aŭstralio, “urbo de preĝejoj” kaj “Ateno de la Sudo” laŭ epitetoj de adelajdanoj fieraj pri sia kulturema metropolo, urbo kiu proprakoste ornamis sian ĉefan avenueon per verdaj flagoj heroldantaj anglalingve: “Esperanto, paco, amikeco”. Sed ankaŭ la unike aŭstraliaj flaŭro kaj faŭno, la famaj kanguruoj kaj koaloj, estis vizite aprezitaj de preskaŭ ĉiuj kongresanoj.

Movade, la analoj notos:

- la maturigon de Kampanjo 2000, kies celaron kaj laborprogramon la Komitato aprobis;
- la pluajn subskribojn dumkongresajn al la Manifesto de la Esperanto-movado, kiun parafis jam pli da personoj (precize, 8599 ĝis la 19-a de aŭgusto) ol UEA havas da individuaj membroj;

- la glatan labor-stilon de nia “parlamento”, kiu faris decidojn sen hasto kaj tempopremo, flue sed certe ne sendiskute;

- la altnivelan reprezentigon de Unesko — en la persono de Denis Cunningham —, organizaĵo kiu ĵus rekonfirmis siajn tradicie bonajn rilatojn kun UEA, atribuite al ĝi novspecan statuson;

- la koncizan sed trafan traktadon de la kongresa temo, “Toleremo kaj justeco en multkultura socio”, kaj la ĉi-teman rezolucion, kiu kunligas, unuflanke, la bezonon komuniki facile kaj egalece en tia socio kaj, aliflanke, la pruvitan utilon de Esperanto fronte al tia defio;

- la intensan, eĉ personan, kontakton de la kongresanoj kun aborigenoj de Aŭstralio, kies kultur-tenaj streboj ilustras la funkciadon de socio pli ol laŭdeklare multkultura;

- la paron da prelegoj eksterkongresaj — sed amase ĉeestataj de esperantistoj — de prof. David Crystal pri la angla kiel tutmonda lingvo kaj, kontraste, de prof. John Wells pri Esperanto, vivpova lingvo internacia;

- la fruktodonan kontakton kun famaj lingvistoj de Universitato de Adelajdo, kiel Peter Mühlhäusler kaj Rob Amery, kiuj vizitis kongreserojn koncernajn al ilia fako;

- la ĉiean aperadon de filma skipo, preparanta tuthoran dokumentaĵon pri Esperanto en Aŭstralio.

Pri ĉiuj ĉi eroj vi povos, kompreneble, pli detale legi sur la sekvaj paĝoj.

Por Loka Kongresa Komitato kunvarbita el plurmil-kilometraj distancoj de la vasta kontinento, organizi UK povis ŝajni akrobataĵo. Ĝiaj membroj tamen kunlaboris tiel nature kvazaŭ samklubanoj, efike kaj eĉ — tiel ŝajnis al eksterulo — malstreĉe. Dank’ al ili, Aŭstralio montris al ni ridetan vizaĝon, kongrue kun la optimisma nacia dirmaniero “ne zorgu, kunulo”.

★

La Solena Inaŭguro de nekutima kongreso estis mem inaŭgurita en nekutima maniero.

Post malheliĝo de la salono aŭdiĝis mallonga parolado de Shirley Peisley, unu el la plej aktivaj kaj influaj gvidantoj de la tutlanda movado por repaciĝo inter aborigenoj kaj postaj ekloĝintoj. Ŝi parolis inspire pri la neceso “kundiĝi tion kion ni alte estimas”. Kaj, jen, la scenejon surprize okupis la dancgrupo Jidaki (nomata laŭ longtuba blovinstrumentego, alinome “diĝeriduo”), kiu plenumis riton de loka tribo, la ganaoj, honore al prauloj.

Pli kutima por kongresanaj okuloj estis la sekva vidaĵo: Ĉe la podia tablego eksidis kvin estraranoj de UEA (ne povis ĉeesti Mark Fettes kaj Fred de Geus) kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller; Ronald C. Gates, rektoro de Internacia Kongresa Universitato; Honora Patrono Ralph Harry; Denis Cunningham, reprezentanto de Unesko kaj ĝenerala sekretario de la Monda Federacio de la Asocioj pri Modernaj Lingvoj; kaj Kep Enderby, prezidanto de Aŭstralia E-Asocio kaj de LKK.

UEA-prezidanto LEE Chong-Yeong emfazis ke la 82-a Universala Kongreso okazas en nova lando, nova kontinento; tamen ni ne diru ke ni venis “konkeri” Aŭstralion, sed pli pacame: “konvinki” ĝin pri la neceso, utilo kaj praktikeco de internacie komuna neŭtrala lingvo.

Kep Enderby parolis pri la multkultura socio en Aŭstralio, kiu restas tia malgraŭ la lastatempa apero de “hansonismo”, dekstra naciisma politika tendenco. Enderby memorigis pri la aktivuloj Ray Ross kaj Les Scott, antaŭ nelonge forpasintaj, kaj pri LKK-ano Vera Payne, kiu ne povis alveturi pro malsaniĝo de ŝia patrino. Li informis ke ĉeestas la ambasadoro de Ĉeĥio, Jaroslav Suchánek, kaj honoraj konsuloj de Italio, Japanio kaj Litovio; skribe bondeziris la ambasadoroj de Argentino, Belgio, Britio, Finnlando, Hispanio, Kanado, Meksiko kaj Svislando; konsuloj de Nederlando kaj Svedio; la gubernatoro de Sud-Aŭstralio, kavaliro Eric Neill; kaj la urbestro de Adelajdo, d-rino Jane Lomax Smith. Enderby esprimis bedaŭron ke ne ĉiuj ricevis vizon kiuj aliĝis al la kongreso.

SOLENA INAŬGURO

Kundiĝi kion ni alte e



Ralph Harry laŭtlegis saluton de Kofi Annan, Ĝenerala Sekretario de UN. En la nomo de Federico Mayor, Ĝenerala Direktoro de Unesko, salutis Denis Cunningham, aŭstralia kunordiganto de la projekto Linguapax, kiun li prezentis en posta tago. Renée Triolle voĉigis la tradiciajn salutvortojn de L.C. Zaleski-Zamenhof. Aŭdiĝis krome la salutoj de kavaliro William Deane, ĝenerala gubernatoro de Aŭstralio, de Alexander Downer, aŭstralia ministro pri eksterlandaj aferoj, de Philip Ruddock, ministro pri enmigrado kaj plurkulturo, kaj de Margaret Reid, prezidanto de la senato. (Ĉi tiuj salutoj aperis en la Kongresa Libro.) Saluton sendis la urbestro de Ipswich (Kvinslando), John Nugent, kaj la prezidanto de la Akademio de Esperanto, Werner Bormann.

La publiko donis plej fortan aplaŭdon al “unu el ili, kiu

Salutmesaĝo de Kofi A. Annan, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

Ĝoje mi salutas la membrojn de Universala Esperanto-Asocio kuniĝantajn en Adelajdo por sia 82-a kongreso.

La temo de via kongreso — “Toleremo kaj justeco en multkultura socio” — estas esenca demando por multaj homoj. En la hodiaŭa mondo ni devas trakti du kontraŭajn tendencojn. Tre multaj aspektoj de nia vivo — ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj — interligiĝas je tergloba skalo, unuigante la homaron pli ol iam ajn antaŭe. Samtempe efikas ankaŭ aliaj fortoj, kreante dividon kaj subdividon de blokoj, nacioj kaj eĉ urboj.


La lingvo havas rolon en ambaŭ ĉi tiuj tendencoj. Ĝi povas kunigi la homojn; ĝi povas esti uzata por disigi nin kaj teni nin apartaj. La lingvo povas esti repacigilo, sed ankaŭ batalilo.

Unuiĝintaj Nacioj stariĝis kun la celo servi kiel centro por harmoniigi la agadon de nacioj en ilia klopodo atingi

amikajn rilatojn kaj internacian kunlaboron. Interkomunikado estas tute fundamenta por tiu celo. Ni havas mesaĝon por proklami — mesaĝon kiu centriĝas al justeco, toleremo kaj homaj rajtoj. La Organizaĵo dependas de la multaj neregistaraj organizaĵoj kiuj laboras kune kun ĝi por helpi komuniki la mesaĝon al la homoj, aparte je la loka nivelo.

Mi estas dankema al Universala Esperanto-Asocio pro ĝia laborado por antaŭenigi lingvon kiel rimedon por kunigi la homojn kaj pro ĝia deziro soleni la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj dum proksimiĝas la kvindeka datreveno de ties akcepto. Mi esperas ke reveninte al viaj komunumoj vi ĉiuj helpos direkti la atenton al ĉi tiu gvidsigna atingo en la strebado por certigi dignan vivon por ĉiuj.

Mi deziras al vi ĝuindan kaj fruktoplennan semajnon en Adelajdo.



Atendante la inaŭguron: en la unua vico sidis ambasadoro Jaroslav Suchánek (dua de maldekstre) kaj lingvisto Rob Amery (plej dekstre).

estas unu el ni": la ĉefia ambasadoro Jaroslav Suchánek tuŝis en sia E-lingva parolado sian infanaĝan fascinan pri Esperanto, kiu ankoraŭ daŭras. (Vd. p. 149)

Alispeca atento necesis por muzikaĵo de Schubert, prezentata de la LKGT-kvarteto el Ipswich, kvar gefiloj (13-17-jaraj) de la komponisto Attila Jurth. La kongresanaro povis ĝoje revidi ilin eĉ dufoje dum la posta semajno.

Trevor Steele koncize kaj humure invitis al nur duhora pritrakto de la kongresa temo, "Toleremo kaj justeco en multkultura socio".

Michela Lipari anoncis kvin honorigojn: prof. John C. Wells (Britio) fariĝis la 12-a membro de la Honora Patrona Komitato, dum d-ro Ivo Borovečki (Kroatio), d-ro Donald Broadribb (Aŭstralio), Jadwiga Gibczyńska (Pollando) kaj prof-ino Liisi Oterma (Finnlando) kalkuliĝas ekde nun al la Honora Membraro de UEA. Iliaj biografioj aperos en la venonta numero.

La laste legitaj salutoj venis de Danny ten Haaf, prezidanto de TEJO, kaj de Yves Peyraut, prezidanto de la Plenumkomitato de Sennacieca Asocio Tutmonda. Ĉi lasta, voĉlegita de YAMASAKI Seikō, aparte aktualis pro historia premiero: unuafoje post la fondiĝo mem de SAT en la Praga UK (1921) okazis fakkunsido de SAT-membroj kadre de Universala Kongreso.

Fine, en longa malferma parolado LEE Chong-Yeong invitis ĉiun al serioza diskuto pri la lanĉota Kampanjo 2000 por pli justa internacia lingva ordo. Li konstatis ke la esperantistaro konsistigas kaj movadon kaj komunumon; por fortigi la komunumon ni bezonas viglan movadon, kaj inverse.

La inaŭguro finiĝis per la "ĉirkaŭmonda vojaĝo" de salutoj el 38 landoj. (Fakte, kongresanoj venis el multaj landoj pliaj.) Ĉi-jare furoris kantado: salut-kantis du danaj knabinoj kaj, laŭ ilia ekzemplo, japano kaj nepalano. Post tia muzika enetosio, la kongresanaro des pli facile kantis kun la LKGT-kvarteto kaj kun la 8-jara knabino Emese Kochárdy nian himnon, "La espero". ★

Mesaĝo de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof

Akceptu, mi petas, miajn tre sincerajn bonven-salutojn. Mi deziras al la 82-a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenanta en Adelajdo, plenan sukceson, kies eĥo laŭte resonu tra la gastama aŭstralia kontinento.

Debatonte pri la *toleremo* kaj pri *justeco* en *multkultura socio*, temo daŭre aktuala sur ĉiuj kontinentoj de nia globo, ni ne forgesu ke ĝuste tiu temo esprimas la bazajn ideojn ĉeestintajn je la naskiĝo mem de la lingvo internacia. La toleremo implicas komprenon: la origina celo de Esperanto estis ja servi tiun komprenon ene de la tiam *multkultura, multlingva socio*. Servi, sen ia ajn minaco al unu aŭ al alia, minaco kiun povus prezenti eventuala altrudo de iu fremda lingvo nacia kaj de ties kulturo. Tiu celo daŭre inspiras nian movadon.

Por meriti vian pardonon, estimataj gesinoroj, pro proklamo de veraĵoj iom banalaj, mi kuraĝas aldoni banalaĵon suplementan: Oni certe sukcesas interkompreniĝi uzante fremdajn lingvojn naciajn. Tamen esperantlingve oni ne nur interkompreniĝas; *oni amikiĝas*... Ĝuste pro la *toleremo* kaj pro la *justeco*, vehiklataj de la lingvo internacia.

KOMITATO KAJ ESTRARO

Malpedanta Komitato mastris sian tempon

Unu programero de la Adelajda UK rikoltis, ĉiujn kvar fojojn kiam ĝi prezentiĝis, pli da publiko ol en lastatempaj, multe pli grandaj UK-oj: la kunsidoj de la Komitato de UEA. Kelkfoje la publiko nombris eĉ pli ol la komitatanoj.

Ke la kunsidoj estis pli interesaj ankaŭ por la publiko, rezultis ne el la tagordo, pli-malpli ja rutina. La nekutimaĵo estis ke oni ne perdis tempon al la ideala lokado de komoj en tiu aŭ jena dokumento nek al harfendado ĝenerale. Pli interesis la komitatanojn kio staras inter la komoj ol la komoj mem. Sekve la diskutoj pasis trankvile, kaj mankis la kutima hasta trakuro de duona tagordo fine de la lasta kunsido — kvazaŭ ĉiu estus tralerninta *La aboco de tempoplanado*. Adelajdo pruvis ke sukceso de kunsido ne dependas de la tagordo sed de la kunsidantoj.

El 78 komitatanoj kun valida mandato ĉeestis aŭ sendis anstataŭanton entute 48. Minimume 40 anonciĝis en ĉiu kunsido. La 39-a ĉeestanto estis ĉiam streĉe atendata, sed ĉiufoje tiu kvorumportanto tamen aperis. Krom en plenkunsidoj, oni aktivis ankaŭ en laborgrupoj. Iu kiu partoprenis ĉion okazantan sub la ŝildo de la Komitato devis oferi 22 horojn al sia rolo de movada parlamentano, se ne enkalkuli la neformalajn diskutojn koridorajn.

Armenia Esperanto-Asocio fariĝis la 59-a aliĝinta landa asocio de UEA; la sesa en la teritorio de la iama Sovetio. Neniu faka asocio petis aliĝon aŭ kunlaboran kontrakton.

Inspiri kaj instigi

En la tagordo elstaris Kampanjo 2000. Okazis unue funda diskuto en laborgrupo, kiu tamen ne elĉerpis la temon, ĉar poste en plenkunsido kontribuis al ĝia traktado ankoraŭ trideko da diskut-intervenoj. Ĉiuj konsentis ke la cirkonstancoj tiom malsamas laŭlande ke ne eblas fiksi precizajn celojn kaj instrukciojn kiujn oni sekvu ĉie. UEA mem ja alprenis kelkajn tute konkretajn taskojn por la proksimaj jaroj, sed aliaj organizaĵoj kaj unuopaj esperantistoj prenu Kampanjon 2000 kiel alvokon de UEA por labori pli vigle kaj serioze, konforme al la propraj kondiĉoj. La kampanjo do celas unuavice inspiri kaj instigi. Pluraj asocioj jam submetis sian agadon al funda analizo, kaj la plej viglaj decidis pri siaj planoj jam antaŭ ol UEA levis la flagon de Kampanjo 2000. Evidente io komencis moviĝi en nia movado. (Pri Kampanjo 2000 vd. pli ĉi-sube.)

En la plenkunsido de la Komitato, trideko da diskut-intervenoj koncernis Kampanjon 2000.



Dum la traktado de la Estrara Raporto pri 1996 la Komitato ĝoje eksciis ke la agado kontraŭ la flankenmeto de UEA ĉe Unesko atingis sukceson. Unesko restarigis oficialajn ligojn kun UEA en la nova kategorio “opera-

ciaj rilatoj”. La kreskintan aktivecon de UEA pri eksteraj rilatoj la Komitato notis laŭde. Multan diskuton vekis la plendo de la Estraro ke la pluekzisto de alia asocio en Kroatio apud la landa asocio de UEA (Kroatia

Ekas Kampanjo 2000 al nova internacia lingva ordo

Plurjaran strategian diskuton kronis en la UK formala aprobo de la ĉefceloj kaj laborprogramo de Kampanjo 2000. Nun ĉiu kunagema E-asocio povas trovi sian lokon en tiu ampleksa agadkadro.

La Kampanjo, kies baza teksto aperis en la aprila numero, finmaturiĝis per unujara interkonsultigado inter la komitatanoj kaj estraranoj de UEA kaj la estraroj de la landaj kaj fakaj asocioj. Ĝi prezentas, do, demokratitan interkonsenton pri la ĉefaj prioritatoj kaj fendaĵoj de la Esperanto-movado en la venontaj kelkaj jaroj. Ĉiuj individuoj, grupoj kaj asocioj estas invitataj partopreni en tiu komuna konstrulaboro.

La konsentitaj celoj, ni rediru ilin ankoraŭfoje, esence estas tri:

- levi la organizan kaj idean nivelon de la Esperanto-komunumo;
- levi la prestiĝon de la internacia lingvo;
- influi la internacian vivon.

Ek al kunlaboro

La unua celo rilatas al tio ke nur fortika kaj motivita E-komunumo povas venki la defiojn de ĉiam pli komplika mondo. Ni ne volas detali ĉi tie la agadojn kiuj estas sugestataj en la kampanja dokumento; ni volas sole substreki ke tiu celo atingeblas nur

per vasta kunlaboro. Kampanjo 2000 ne estas kampanjo por la Estraro aŭ la Komitato de UEA. Ĝi estas kampanjo por ĉiuj aktivaj esperantistoj.

Do, ne temas nur pri la fortigo de niaj kulturaj kaj organizaj centroj, kvankam tio gravas. Egale temas pri fortigo de la interhomaj rilatoj kiujn E-o peras. Nur vasta kaj forta reto de individuaj kontaktoj povas garantii la progreson de la landaj asocioj kaj de UEA. Tio povas signifi: transformi niajn klubojn en viglajn centrojn de amuziĝo kaj kleriĝo. Tio povas signifi: helpi al la fakaj asocioj varbi novajn membrojn kaj montri sian agadon al la esperantista publiko. Tio povas signifi: trovi novajn manierojn por malfermi niajn kongresojn kaj renkontiĝojn al familioj, al gejunuloj, al handicapuloj. Tio povas signifi: interligi niajn revuojn kaj interretajn diskutejojn por laŭeble vastigi iliajn abonantarojn. Kaj tiel senfine plu.

Alivorte, la E-organizaĵoj ne interkonkurencas. La forteco de ĉiu el ili efikas pozitive al ĉiu alia. Imagu ni, ekzemple, ke TEJO, ILEI, aŭ an-

kaŭ SAT, AIS aŭ Bahaa E-Ligo sukcesus esti multe pli grandaj ol UEA mem, kun multe pli da membroj, pli bona centro ktp. Ĉu el tio ne sekvus pozitivajoj por ĉiuj ceteraj E-organizaĵoj, pli da legantoj por iliaj revuoj, da partoprenantoj ankaŭ en iliaj kongresoj k.s.?

Do, for la apartismon inter organizaĵoj kaj ek al kunlaboro. La mondo en kiu ni devas agi estas tiom vasta ke ĝi liveras abundan ago-spacon al ĉiu. Devize oni povas diri: “Ĉio kio estas bona por Esperanto, estas bona por ĉiuj Esperanto-organizaĵoj.”

Informi kaj influi

La dua celo de Kampanjo 2000 (levi la prestiĝon) instigas al serioza informado. Preter la detaloj pri la unuopaj agoj, ni nur volas emfazi ke precipa tasko de ĉiu aganto por E-o estas informado pri la ekzisto kaj funkciado de la internacia lingvo. Niaj organizaĵoj ofte emas koncentriĝi ekskluzive al servado de siaj membroj. Kvankam tio estas io bona kaj necesa, restas la fakto ke ni ĉiuj ŝuldas nian ekziston al la informa agado de Zamenhof. Se li ne dissendus siajn dek mil broŝurojn, nenio okazus. Kaj se ne plu daŭros la informa agado, baldaŭ ŝrumpas kaj malvigliĝos la komunumo kiun ĝi sukcesis krei. Imitado de Zamenhof (kie eble per teknologie evoluantaj rimedoj) ankoraŭ restas kerna tasko de la movado kaj de ĉiu ĝia konsistiga ero.

E-Ligo) “iom ĝenis”. Post la klarigo de estraranoj ke en ĉiu lando UEA preferas harmonian movadan laboron kadre de komuna asocio, oni akceptis alvokon al la kroataj esperantistoj ke ankaŭ ili klopodu baldaŭ atingi tian situacion.

Diskuton vekis ankaŭ la krizo en Pola E-Asocio, kies gvidantojn la jarraporto de UEA kritikis pro “senkonsileco”. La Komitato rekomendis al la Estraro sendi leteron al polaj esperantistoj por instigi ilin restarigi fortan PEA per tutlanda kongreso.

Ne sen diskuto oni akceptis la proponon de la Estraro plialtigi la membrorokotizon. Nome, leviĝis voĉoj por plialtigi ĝin pli forte ol la Estraro proponis, i.a. por ebligi dungon de plia oficulo en la CO, kies troa laborpremo daŭre maltrankviligas la komitatanojn. Tamen ĝuste la CO kontraŭis ke la kotizoj kresku pli ol laŭ la nederlanda inflacio. Tro forta pli-

altigo verŝajne signifus ke malaltiĝus la membronombro, sekve ne kreskus la kotiz-enspezoj. Plimulto de la komitatanoj pensis same: la estrara propono plialtigi la nederlandan MA-kotizon de 100 al 103 gld. estis akceptita. Por kelkaj landoj la kotizoj tamen ne altiĝos, ĉar iliaj valutoj plifortiĝis kompare kun la guldeno.

Akceptiĝis nova regularo pri elektoj, kvankam oni elektis komisioneton kun la rajtigo iom repoluri kaj konsekveci kelkajn detalojn. La regularo spertos fajrobapton en la venonta jaro, ĉe la elektoj de la gvidorganoj de UEA. La nova regularo forigas nebulaĵojn de la antaŭa. Ĝi plifortigas la rolon de la elektokomisiono, kiu devos regule raporti al la Komitato pri kandidatigoj kaj cetera progreso de elekto-preparoj, precipe koncerne la Estraron. Oni esperu ke la nova regularo ne fariĝis tro malnebula, ĉar la rezulto de elekto ja pli gravas ol ties proceduro.

La Komitato aprobis, flanke de UEA, la konsiston de nova komisiono pri la Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, kun prezidanto Atilio Orellana Rojas (Argentino) kaj sekretario Hans ten Hagen (Nederland). (Vd. la planan liston en Jarlibro 1997, p.80.)

Dum la UK kunsidis ankaŭ la Estraro de UEA, kvarfoje. El ĝiaj multaj decidoj de diversa graveco menciindas i.a. elekto de Kalle Kniivilä (Svedio) kiel komisiito pri informado, por kompensi la mankon de tiukampa estrarano; aŭspiciado de la usona instruvidbendo *Esperanto, pasporto al la tuta mondo*; aprobo de la LKK por la Berlina UK (1999), kaj difino de temo por la Montpeliera kongreso (1998): “Mediterraneo — ponto inter kulturoj”. La demando ĉu en la jaro 2000 UK gastos en Tel-Avivo aŭ Zagrebo, ankoraŭ ne ricevis respondon. Post longa diskuto la decido estis prokrastita ĝis la komenco de 1998. **ob**

Fine, la tria celo agnoskas la komunajn idealojn kiuj kunligas preskaŭ ĉiujn esperantistojn kaj kiujn laste resumis la Manifesto de Prago. Temas pri la espero ke per E-o iam saniĝos la internacia lingva ordo, ke ĉiu homo, ĉie en la mondo, povos uzi kaj disvolvi la lingvojn de sia heredaĵo kaj de sia elekto, sen kontraŭdiroj. Kiel la Kampanjo mem, ankaŭ tiu ĉi prioritato direktiĝas al diversaj organizaj niveloj. Plej konataj, kompreneble, estas la klopodoj influi internaciajn organizaĵojn, kaj tiujn ni energie daŭrigos: ĉefe per UEA-reprezentantoj en diversaj strategiaj lokoj kaj forumoj, kvankam la landaj asocioj estos siatempe petataj influi sialandajn delegitojn en la decidoj.

Tamen ne en la asembleoj de UN komenciĝos la nova internacia lingva ordo. Ĝi naskiĝos el la decidoj de individuoj ŝanĝi sian lingvan konduton, kaj el la kunlaboro de tiuj individuoj por ŝanĝi la lingvopolitikon de siaj institucioj. Tio estas laboro multe pli vasta. Ĉiu edukministerio kunkreas la internacian lingvan ordon, instruante kelkajn lingvojn prefere al aliaj; ĉiu internacia neregistara organizaĵo laboras por la konservado aŭ la ŝanĝo de tiu lingva ordo per la uzado de tiu aŭ alia laborlingvo. Kaj tiujn decidojn sialanke apogas aŭ malapogas la gepatroj, edukistoj, organizantoj kaj aktivuloj. Jen do la homoj kiujn ni devas atingi, kies konvinkojn ni devas aliigi.

La ĝojo plani

Kampanjo 2000 antaŭvidas ke E-organizaĵoj ĉiunivele formulos la propran planon. UEA jam donis ekzemplon: en Adelajdo la Komitato aprobis laborprogramon por la venontaj jaroj, ĉefe rilate al tio kion faros la centraj organoj de UEA kune kun la fakaj kaj landaj asocioj (FA/LA). Jen ĝi:

1. Internacia seminario, “Esperanto en lernejo”, 1998, Montpeliera UK (Unesko, UEA, ILEI)
2. Eksperimenta instruado de E-o, 1998-2000 (Unesko, UEA, ILEI, LA)
3. La 90-jara jubileo de UEA, 1998 (UEA)
4. Kampanjo “Savu esperantaĵojn”, 1998-2000 (UEA, FA, LA)
5. Kampanjo “Plivastigu Verdujon”, 1998-2000 (UEA, FA, LA)
6. Disvastigo de informiloj pri Esperanto, 1997-2000 (UEA, FA, LA)
7. Seminario “Esperanto-amaskomunikiloj”, 1998 (UEA, TEĴA)
8. Amikoj de Esperanto, 1998-2000 (UEA, FA, LA)
9. Seminario pri lingvaj dimensioj de homaj rajtoj, 1998 (UEA, UN)
10. Kampanjo por internacia lingvo, ĉe UN, 1998-2000 (UEA, LA)
11. Koalicio de neregistaraj organizaĵoj por internacia lingvo, 1997-2000 (UEA)
12. Seminario en Eŭropa Parlamento, 1998 (Eŭropa Unio, Laborgrupo pri lingva problemoj)

13. La 2-a Nitobe simpozio, 1999 (UEA, Eŭropa Unio/Parlamento)

La laborprogramo antaŭvidas serion de agadoj por produkti kaj disvastigi novajn informilojn al individuoj kaj amaskomunikiloj, sekvante la ekzemplon de Zamenhof, kaj fine ĝi antaŭvidas agadojn pli internajn por klerigo de nia komunumo, kiel la festado de la 90-jariĝo de UEA aŭ kunordigo de la klopodoj por savi esperantaĵojn en kaj ekster bibliotekoj.

Nu, tiuj estis la decidoj en Adelajdo. Nun ni atendas entuziasman ekagon de la E-movado, kies organizaĵoj estos kontaktataj unuope dum la venontaj monatoj. Tamen ne necesas atendi rektan instigon! Ni petas ĉiujn FA kaj LA, same kiel aliajn sendependajn E-organizaĵojn, detale kaj konkrete formuli siajn 3- aŭ 5-jarajn laborplanojn, konsiderante specifajn situaciojn. Kelkaj LA (ekzemple la japana), ILEI kaj Amerika Komisiono jam difinis tian aŭ eklaboris pri la planado. Se vi bezonas pli da informoj por formuli laborprogramon, aŭ se vi jam pretigis laborprogramon kiun vi deziras interŝanĝi kun aliaj, bonvole kontaktu la Kunordigan Komisionon (LEE Chong-Yeong, Renato Corsetti, Osmo Buller).

Sed antaŭ ĉio ni memoru ke, se Zamenhof atendus instigon de komisiono antaŭ ol dissendi la dek mil broŝurojn, tre verŝajne hodiaŭ vi ne legus ĉi tiujn liniojn. ★

Unesko-UEA: operaciaj rilatoj

Pasintjare ni raportis (jul.-aŭg., p.121) pri minacanta ĉesigo de la oficiala statuso de UEA ĉe Unesko, lige kun la ekapliko de novaj reguloj pri rilatoj kun neregistaraj organizaĵoj (NRO-j).

Dum la jaroj Unesko starigis t.n. konsultajn rilatojn kun centoj da NRO-j, ĝis tiu sistemo fariĝis tro mamuta kaj neefika. Konsultaj rilatoj ekzistis en tri kategorioj: A, B kaj C. Du E-organizaĵoj ĝuis ilin: UEA en kategorio B kaj Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj en kategorio C.

ties idealojn pere de siaj informretoj devus ne esti preteratentita.”

Samaj rajtoj, atentindaj devoj

UEA plu ĝuas similajn rajtojn kiel antaŭe, kaj ĝiaj ŝancoj por financa subvencio al konkretaj projektoj eĉ iĝis pli grandaj. UEA tamen devas pli



Dennis Cunningham (dekstre) reprezentis Uneskon en la Adelajda UK.

La Ĝenerala Konferenco de Unesko en 1995 anstataŭigis la malnovajn konsultajn rilatojn per novaj kategorioj: formalaj rilatoj (kun la subkategorioj: asociaj kaj konsultaj rilatoj) kaj operaciaj rilatoj. Reklasifike la NRO-jn oni celis forigi tiujn kies kontribuo al la agado de Unesko ne estis sufiĉa. La oficistoj kiuj traktis la kazon de UEA, asertis ke la “agadtereno de UEA estas tro margena al la prioritatoj de Unesko”. Aperis do reala minaco ke, post kvar jardekoj da oficiala partnereco kun Unesko, UEA trovos sin ekster ĝi.

Estraranoj kaj aliaj aktivuloj de UEA komencis aktive kampanji ĉe funkciuloj de Unesko por konservo de oficiala statuso de UEA ankaŭ sub la novaj direktivoj. Membroj de la Honora Patrona Komitato skribis rekte al Ĝenerala Direktoro Federico Mayor. Tiu aktivado finiĝis venke en junio, kiam la Plenumkomitato de Unesko decidis akcepti UEA en la kategorio de operaciaj rilatoj. Tion ĝi faris surbaze de raporto de Mayor, kies fina konkludo estis: “La grava laboro farita de UEA por disvastigi la mesaĝon de Unesko kaj antaŭenigi

atenti pri siaj devoj, ĉar Unesko daŭre observos ilian plenumadon. Nia partnereco kun Unesko tro lamiĝis lastatempe, kvankam multaj el ĝiaj programoj kaj projektoj, kiel Linguapax, Kulturo de Paco, Universala Etiko, Jardeko de Indiĝenaj Popoloj k.a., kongruas kun niaj propraj celadoj. Ankaŭ Mayor en sia raporto plendis ke la kunlaboro inter Unesko kaj UEA estis tro limigita. Ni donu novan elanon al ĝi. Tio koncernas ne nur la “centran” UEA, sed precipe la landajn asociojn kaj eĉ klubojn, kiuj serĉu kunlaboron kun Unesko-asocioj kaj kluboj.

Per la NRO-reformo oni celis raciigon ankaŭ tiel ke al unuopa agadtereno aŭ komunumo Unesko rilatu tra ties ĉefa reprezentanto. Ĉar UEA estas tio por la E-komunumo, Unesko ne bezonis daŭrigi la rilatojn kun ILEI. La voĉo de ILEI tamen ne silentos, ĉar ĝiaj Unesko-representantoj kuniĝos kun tiuj de UEA. Sekve nia laborkapablo en Parizo plifortiĝos, tiel ke dank’ al la reformo ankaŭ ni povos ĝui la fruktojn kiujn Unesko mem volis atingi, nome raciigon kaj efikigon.

Osmo Buller

Kleriĝi pri la kongresa kontinento

Serio da prelegoj pritraktis temojn koncernantajn Aŭstralion el diversaj vidpunktoj.

Unue Margaret Furness priskribis mediajn problemojn de Aŭstralio. La longtempe izolita landego suferis neantaŭviditajn sekvojn de modifoj en la medio kiujn kaŭzis eŭropaj koloniistoj. La vivsistemo de la novaj eŭrop-devenaj loĝantoj kaj precipe la moderna agrikulturo, same kiel la enkonduko de iuj bestoj kaj plantoj, rezultigis gravajn problemojn, kiuj hodiaŭ ankoraŭ atendas solvon.

Ekseksa ambasadoro de sia lando ĉe UN, Ralph Harry sukcesis tre precize skizi la eksteran politikon de Aŭstralio. Tiu politiko komenciĝis, en neoficiala maniero, jam antaŭ la fino de la 19-a jarcento, kiam la britaj kolonioj de Aŭstralio ekinteresiĝis pri

Gaste ĉe aborigenoj

Dum la ekskursi merkredo trideko da kongresanoj vizitis la aborigenan kolezion Taoundi en la kvartalo Port Adelaide, gvidate de instruisto Sandor Horvath, kiu laboras tie.

En la kolegio studas aborigenoj ne nur el la ĉirkaŭaĵo de Adelajdo (kiuj estas de la etno ganaa) sed ankaŭ el aliaj ŝtatoj de Aŭstralio.

La interkonatiĝo pasis en tre malstreĉa etoso, dank’ al gitar-sonoj (ĉe la esperantista flanko kanzonis Julián Hernández el Kubo) kaj al la amuza Cseh-metoda instruado de Katalin Smidélusz. Sekvis vizito tra la kolegia konstruaĵo, lumbilda prezento de artverkoj fare de la kolegianoj kaj klarigo pri la aborigenaj ilaro kaj vivmaniero. Grandan emfazon ricevis la nesufiĉe konata diverseco de aborigenaj kulturoj tra la kontinento, kiuj nombras

la ekstera mondo, precipe pri Sud-Orienta Azio kaj Pacifiko. Post la federigo de la kolonioj (1900) kaj post la du mondmilitoj, en kiuj la lando aktive partoprenis, Aŭstralio fariĝis finfine verasenca "mondcivilitano", estante aktiva membro de UN kaj fervore batalante en ĝi por malarmado, ĉesigo de atomprovoj kaj por la tuta forigo de nukleaj armiloj.

Tute neformale klerigis nin Trevor Steele pri la aborigenoj. Doninte skizon pri la diversaj praloĝantoj, li respondis al praktikaj demandoj de la publiko, ofte per anekdotoj pri siaj spertoj kiel instruisto inter la homoj de rezervejo en norda Arnhem-lando. Li sukcesis pliproksimigi publikon internacian al la aparta, ofte miskonata kaj tamen pra-antikva popolo de aborigenoj.

Pri aborigenoj el lingva vidpunkto prelegis John Wells, aparte valore por esperantistoj, kiuj tre atentis pri minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Efektive minoritataj fariĝis la aborigenaj lingvoj, se oni konsideras ke en 1788 ankoraŭ 250 estis parolataj: plu vivas

nun ĉ. 100, sed nur dudeko el ili restas iom signife parolata. Ene de unu generacio tiuj nombroj verŝajne plu malkreskos. Krom fonetika, morfologia kaj sintaksa analizo, Wells pritraktis kuriozan aspekton de la aborigenaj lingvoj, la t.n. "bopatrinan lingvaĵon": en ili ekzistas "tabuaj" vortoj kiujn oni devas eviti parolante ekzemple kun bopatrino, ĉerpante anstataŭe el speciala vort-trezoro.

Wells enkondukis ankaŭ al la aŭstralia angla lingvo, kadre de triparta kurseto. Krom doni historian kaj fonetikan fonon, Wells instigis la ĉeestantojn aktive kunlabori. Aŭstralianoj klarigis la signifojn de siaj "strangaj" vortoj kaj demonstris sian kutiman prononcon. La neaŭstralianoj tre amuziĝis, multe demandis kaj komentis pri fonetikaj "strangaĵoj" kaj leksikaj apartaĵoj.

La tuta priaŭstralia serio, altkvalita, bonege respondis al la forte sentata neceso pli bone kompreni tiun "foran" kaj "ekzotan" kontinenton, kien multaj kongresanoj venis unuafoje en sia vivo.

Fabrizio Pagliaroli (Italio)

Historia SAT-kunsido

La saluto de Sennacieca Asocio Tutmonda, legita dum la kongresa malfermo, aŭguris historian eventon: unuafoje post 1921 okazis fakkunsido de SAT-membroj kadre de UK.

Kolektiĝis 36 personoj, el kiuj 14 SAT-membroj — surpriza nombro, ĉar multaj fakkunsidoj en ĉi tiu UK altiris ne pli ol dekon da personoj. Malgranda UK, granda SAT-kunsido: tio faris kontraston.

Prezidis Gilbert Ledon. YAMASAKI Seikō klarigis kial li iniciatis ĉi tiun fakkunsidon: instigis lin la sperto de la Unua Azia Kongreso en Ŝanhajo pasintjare, kies plej vigla kaj interesa programero estis ĝuste la SAT-kunsido. Ĉar SAT kaj UEA estas lastatempe en bonaj rilatoj, kial ne ripeti la sperton en UK? Efektive, aperis parte samaj vizaĝoj en Adelajdo kiel en Ŝanhajo.

Leginte la mesaĝojn de Yves Peyraut, prezidanto de la Plenumkomitato, kaj Krešimir Barković, ĝenerala sekretario de SAT, Ledon instigis la ĉeestantojn al libera diskuto. SAT-membro kaj LKK-estro Kep Enderby parolis la unua: laŭ li la SAT-statuto eksmodiĝis, ĉar ĝi reflektas pensmanierojn de antaŭ 40-70 jaroj. Intertempe SAT ŝrumpis. Por progresi, ĝi devas krei al si pli modernan bildon. Ledon emfazis ke SAT estas eduka, kleriga organizo, kiu toleras en sia sino diferencajn opiniojn, por kiuj troviĝas frakcioj. Laŭ Tom Elliott (Aŭstralio) gravas ekologio, ĉar la agadtereno de SAT estas ekonomia, natura kaj morala.

Osmo Buller anoncis ke li intencas konsiliĝi kun SAT pri kunlaboro, ja UEA kaj SAT ne estas rivalaj organizaĵoj: laŭstatute, la unua laboras por, la dua per Esperanto. UEA ŝatus ke SAT estu enplektita en ĝia Kampanjo 2000; aliflanke, UEA povus laŭnecese finance helpi la eldonon de nova PIV.

En Francio, kie okazos la venonta UK, ekzistas tre forta landa asocio de SAT. Ĉu la vojo pretigita de Yamasaki kondukos ankaŭ al Montpeliero?

Laŭ raporto de YAMASAKI Seikō

Signifa parto de la instruado ĉe Kolegio Taoundi koncernas arton kiel rimedon por sinesprimo, kiu mildigas la rompon inter tradicio kaj moderno.

pli ol 300. Bedaŭrinde malmultaj aborigenoj povas rigardi al la estonteco kun certeco pri la sorto de siaj lingvo kaj kulturo.

La kvarhora vizito reciproke riĉigis la ĉeestantojn: kiel vortigis unu el la gastigintoj, la esperantistoj malfermis por la kolegianoj fenestron al la mondo, dum ĉi tiuj klerigis la kongresanojn pri siaj specifaj kulturoj, tiom pli proksimaj al la naturo ol estas la urbaneca plejparto el ni, esperantistoj.

En posta tago Rob Amery, lingvisto de la Universitato de Adelajdo, prelegis kaj montris vidbendon pri la provoj revigligi resp. revivigi du lokajn




Foto: Kolegio Taoundi

indiĝenajn lingvojn. Unu paralelo inter la situacio de Esperanto kaj de — ekzemple — la ganaa lingvo estas ke la parolantoj de ambaŭ vivas dise kaj lernas la lingvon kun malmulta subteno el sia medio. Tamen, la aborigenaj lingvoj devas krome venki la problemon de malsufiĉaj historiaj fontoj por helpi ilian revigligon, aŭ eĉ — en iuj kazoj — rekreon.

ie

Dorna vojo al multkultureco

Sukcese ripetiĝis Praga formulo, du horoj da kongrestema kunveno — ĉi-jare sub la gvido de Trevor Steele.

Toleremo kaj justeco en multkultura socio”, la ĉi-foja temo, estas io simile mozaika kiaj estis la manpleno da mallongaj prezentoj el diversaj mondpartoj plurkulturaj.

Emocian tonon donis enkonduka vivrakonto de Mona Tur, aboriginino kies patro estis irland-devena. En ŝia infanaĝo aŭstraliaj ŝtatinstancoj forprenadis de gepatroj miksrasajn infanojn por eduko en misiistaj lernejoj. Tia sorto minacis ankaŭ ŝin kiel knabineton. Feliĉe, ŝi eskapis de la policanoj ŝin serĉantaj — sed nur dank’al longa, angoriga kaŝiĝo, pro kiu ŝi ĝis hodiaŭ restas klostrofobia.

Gilbert Ledon (Brazilo) atentigis pri la paradoksaj flankoj de kontraŭrasismo. Ralph Harry (Aŭstralio) rezonis pri la toleremiga kapablo de komuna lingvo. Eddy Raats, flandro, parolis pri sia plur-etna ŝtato Belgio. Josef Šemer detalis la tensiojn inter ortodoksaj kaj malpli piaj judoj en Israelo: ĉi lastaj, majoritataj, cedas al postuloj de la unuaj en multaj aferoj, sed ili ja ne povas cedi senlime. Miguel Faria de Bastos (Portugalia) ne hezitis

kritiki la rolon de Aŭstralio en la lastatempa tragedio de Orienta Timoro, eks-kolonio portugala, kiun Indonezio aneksis kaj genocide subpremas.

En la dua parto, Kep Enderby (Aŭstralio) klarigis la dornan vojon de sia lando al multkulturismo. Post pli ol jarcento da blankul-favora politiko kaj fremdul-suspektismo pro timo de invado, en 1973 eknaskiĝis novaj leĝoj kontraŭrasismaj kaj por-aboriginaj. Lastatempe aperis dekstrula, ksenofobia reago, tial ke multaj timas malaltiĝon de sia vivnivelo. Ĉar malklereco estas natura grundo por tiaj movadoj, Enderby konkludis ke toleremo kaj justeco gravas — sed krome necesas klereco. Marija Belošević (Kroatio) informis per multaj ciferoj pri 16 etnaj grupoj sialandaj, sed ni ne aŭdis pri la serba-kroata konflikto. Daniele Vitali analizis la antaŭjuĝojn regantajn en Italio kaj ties ŝanĝiĝojn lastatempajn.

Publikanoj en kvaronhora diskutado reagis al iuj punktoj, kaj pritema rezolucio estis akceptita post kelkaj modifoj.

István Ertl


Sen duelo

Multaj esperantistoj ĉeestis du eksterkongresajn prelegojn lingvistikajn.

En la Brajtona UK (1989) prof. John Honey kaj prof. John Wells publike debatis pri la angla kaj E-o kiel mondlingvo. Ĉi-jare la tiama temo reaperis po duono, en du apartaj prelegoj organizitaj de la Centro por Interkulturaj Studoj kaj Multkultura Edukado (Universitato de Adelajdo). La du prelegantoj ne povis ĉeesti la referaĵojn unu de la alia, iliaj asertoj do ne konfrontiĝis en debata duelo.

Prof. David Crystal — probable la plej konata brita lingvisto — prelegis pri “Tutmonda angla — Ĉu aliaj lingvoj povos postvivi?”, la temo de lia

nova libro *La angla kiel tutmonda lingvo*. Laŭ li la parolantaro (ne plu plejparte denaska) de la angla jam atingis la kritikan mason por igi ĝin la tutmonda



lingvo, kvankam drastaj ŝanĝoj en la monda lingva situacio ne ekskludeblas — sed malverŝajnas. Laŭ Crystal, ĉie kunvivis po du specoj de la angla, kun malsama uzo: je loka nivelo funkcias variantoj identec-reflektaj, dum por interkomuniko tutmonda oni uzos ĉie saman “norm-anglan parollingvon”, kies unuecon garantios ĝia funkcio mem. Pri la formortado de malgrandaj lingvoj (por kies savo farendas ĉio ebla) Crystal pensas ke kulpigi nur la anglan estus simplige, ĉar ĉia kunvivo de pluraj lingvoj implicas subpremon de unuj al aliaj.

Du tagojn poste prof. John Wells prelegis pri temo ŝajne riposta, “Esperanto, ĉu vivpova lingvo internacia?” Liaj faktoj kaj argumentoj ne estus novaj por la legantoj de ĉi tiu revuo, sed tio ne igas ilin malpli veraj. Li emfazis la maljustecon de la nuna monda komunik-sistemo, regata ne de racio kaj efikeco, sed sole de potencrilatoj.

István Ertl

KONGRESA REZOLUCIO

La 82-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Adelajdo de la 19-a ĝis la 26-a de julio 1997 kun 1224 partoprenantoj el 57 landoj, kaj traktinte la kongresan temon “Toleremo kaj justeco en multkultura socio”, konstatas ke

1. pro moderna tekniko kaj politika kaj ekonomia evoluo, en pli kaj pli da landoj estiĝas multkulturaj socioj;
2. samtempe la mondo, kiel tuto, fariĝas unu socio multkultura;
3. harmonia funkciado de multkultura socio eblas nur sur bazo de justeco kaj toleremo;

4. respekto al lingvaj rajtoj kaj lingva toleremo estas esencaj elementoj de sociaj justeco kaj toleremo;

atentigas ke

1. en lando kun multkultura socio oni ofte bezonas komunan lingvon;
2. same en la tutmonda multkultura socio oni bezonas neŭtralan komunan lingvon, kiun ĉiuj homoj povas relative facile lerni por komuniki egale kun aliaj membroj de tiu tutmonda multkultura socio;

agnoskas la rajton de ĉiu komunumo daŭre uzi siajn proprajn tradiciajn lingvojn;

substrekas ke Esperanto jam montris ke ĝi povas ludi gravan rolon kiel neŭtrala kaj egala komuna lingvo por la tutmonda socio; kaj alvokas al pli vasta uzado de Esperanto en la edukaj programoj de ĉiuj landoj.

“Kiam mi aŭdis ‘La espero’...”

Konanto de Esperanto, ĉeĥa ambasadoro Jaroslav Suchánek donis intervjuon komunan al nia revuo, *Heroldo de Esperanto* (HdE) kaj Pola Radio (PR).

Kiel vi lernis Esperanton?

En sepjara aĝo mi lernis pianludi, sed tio ne tre plaĉis al mi. Iun tagon, promenante kun panjo, mi ekvidis afiŝon pri Esperanto-kurso. Mi ne sciis kio estas Esperanto; mia panjo sciis, ĉar ŝia patro posedis E-librojn. Rapide ni interkonsentis ke anstataŭ muzikon mi lernu lingvon, kaj post unu semajno mi ekvizitadis la kurson. Unu-du jaroj sufiĉis por scii la lingvon, kaj mi plurfoje iris al tendaro apud lago, kie mi konatiĝis kun esperantistoj el pluraj landoj. Bedaŭrinde, post miaj universitataj studoj mi ne plu okupiĝis pri Esperanto.

PR: Estante diplomato, kiel vi vidas la internaciajn lingvajn rilatojn?

Nun eble estas la lasta ŝanco de Esperanto por eniri la publikan konscion, ĉar la angla lingvo mondscale ektransprenas la rolon por kiu Esperanto estis lanĉita. Tamen, en la larĝiĝanta Eŭropa Unio kreskas la konscio

pri la lingva problemo. Mi mem vidis en Luksemburgo kiom oni devas ŝviti pro la taskoj kiujn kreas 11 laborlingvoj; imagu la samon kun, ekzemple, 25 membroŝtatoj! Mi ne povas imagi ke ajna nova membro akceptus rezigni pri la uzo de sia lingvo, nek ke ĉiuj konsentus pri la ekskluziva uzo de la angla aŭ alia nacia lingvo. Sed samtempe pli forte sentiĝos la bezono je komuna lingvo. En tiu kontraŭdira situacio povus aperi, ni diru pro senespero, pli da konsidero al Esperanto. Pensu kiom da eŭro-parlamentanoj jam nun subtenas la ideon serioze konsideri E-on, kiel atestas la listoj de s-ro Pirlot. Kiam ne plu prokrasteblos la decido, oni povos konsideri nur neŭtralajn lingvojn, kiel Esperanto, la helena aŭ la latina.

HdE: Ĉu al tia ŝanĝo de sinteno e-istoj povas pli bone kontribui ene de la oficialaj instancoj aŭ ekster ili?

En la instancoj tro malmultas la

subtenantoj de Esperanto. La decido dependas de politikistoj, kiuj ĝis nun maltro scias pri E-o. Esperantistoj devas pli aktive lobiadi.

Kiajn lingvajn spertojn vi havas en via propra laboro?

Aŭstralio estas anglalingva lando, do ĉiuj diplomatoj ĉi tie devige regas la anglan. Mi ne scias ĉu tio kaŭzas iujn problemojn, sed mi imagas ke la situacio povas esti malsama en landoj kun ekzemple la franca, germana, hispana lingvo; eble tie okazas “lingvaj bataloj”. Aludon al Esperanto mi neniam vidis dum la kvar jaroj de mia restado en Kanbero: tial mi estis surprizita pro la invito ĉi tien — kaj mi kaŭzis miaflanke surprizon per mia E-scipovo. Cetere, kiam mi aŭdis “La espero”, mi tuj rememoris parkere la unuan strofon...

En Kanbero mi konatiĝis kun multaj aŭstralianoj kiuj, malgraŭ vanaj provoj lerni fremdan lingvon, konas nur la propran. Ĉi tie mi renkontis aŭstralianojn kiuj tre bone scias sian duan lingvon kaj, plej imprese, propagandas ĝin anstataŭ sian gepatran lingvon. La plej aŭtenta argumentado por Esperanto venas el la buŝo de anglalingvanoj! ★

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

Spektro de homa kulturo

La sep prelegoj de Internacia Kongresa Universitato (IKU) kovris larĝan spektron de la homa kulturo, inkluzive arton, lingvistikon kaj socian sciencon.

Laŭ enhavo kaj lingva kvalito la tre edukvaloraj prelegoj estis, efektive, je universitata nivelo, kaj eblis anticipe aĉeti broŝuron kun kvin el ili.

IKU-rektoro prof. Ronald Gates hipotezis ke la malbelecon de diversaj artformoj dum nia jarcento kaŭzis la plimultiĝo de la homaro, de la ekonomia produktivo kaj de aĉetpovo. La patronojn de artistoj anstataŭis la ŝtato kaj entreprenoj. Pli da “artistoj” pliiĝis la konkurencon kaj la eksperimentemon, kio ofte rezultigis malbelaĵojn. Gates esperas ke sekva-jarcento la “pendolo de estetikaj modoj” ŝvingiĝos en la kontraŭa direkto.

Prof. Alan Bishop surprizis multajn kiuj kredis matematikon tedaĵo, montante kiel diversaj kulturoj malsame

traktas iujn matematikerojn, ekz. nombrosistemojn aŭ kalkulmetodojn.

Prof. John Wells klarigis la koncepton de hiperteksto, malsimila al tradicia linia teksto perceptata pasive, sen influo al la sinsekvo. Ĉe hiperteksto eblas aktive influi la sinsekvon kaj ignori partojn nekoncernajn. La plej evidenta nuntempa ekzemplo de hiperteksto estas la Tut-Tera Teksaĵo, kiu ligas milionojn da homoj. Wells ankaŭ utile konsilis pri kreado de propraj “paĝoj” en la tutmonda reto.

Prof. LEE Chong-Yeong komparis ekonomike la racian modelon de okcidenta protestanta etiko kaj la afekcian modelon de orienta Konfucea etiko. Ambaŭ havas porojn kaj kontraŭojn, sed ambaŭ ebligas ekonomian kreskon.

Lee proponis kombini ilin, en la “ĝusta mezo”, al racie afekcia modelo.

Trevor Steele prelegis pri la sola aŭstralia Nobel-premiito literatura, Patrick White. Nekutima personeco, White estis samseksamulo, kiun malagrablaĵ frujaj spertoj pri homoj faris kverlema, kaprica kaj nealirebla. Li verkis en stilo ekstreme subjektiva, sensoriĉa kaj foje mistikema.

Brian Fox informis pri la historio de la nov-zelandaj maorioj antaŭ kaj post la eŭropana enmigrado. Li eĉ montris rilatajn objektojn kaj plantojn, kaj demonstris la maorian lingvon.

Mauro La Torre traktis problemojn de terminologio, nomante “desuprismo” kreadon de terminaro post apriora difinado de koncepto-retoj, kaj “desubismo” trakribadon de ekzistantaj fakaj tekstoj por konstati la realan uzon de terminoj. La terminologia laboro aplikas ambaŭ metodojn, komplemente utilajn.

Sándor Monostori (Aŭstralio)

"Mi ne celas nutri stereotipojn"

Dum kvar tagoj kongresanoj vidis ĉie filman skipon interesatan pri ĉiu detalo de la UK. Ni demandis reĝisoron Paul Williams, sendependan filmiston el Melburno, pri la kialoj de tiu fervoro.

Kiel vi ekideis fari filmon pri E-o?

Mi supozas miajn kialojn nekutimaj, ĉar mi ja ne estas mem esperantisto. Tamen la lingvo ĉiam interesis min, de kiam mi trafis aron da antikvaj Esperantaj prononcdiskoj en iu disvendo. Sed ĉar mi trovis tre malmulte da informoj pri la lingvo kaj pri la aŭstralia movado post la 50-aj jaroj, mi supozis ke ĝi simple formortis ĉe ni, kaj mi revenis al mia esploro nur post jaroj, kiam mi trafis E-on en la telefonlibro de Melburno. Tiel mi iom post iom ekrenkontis lokajn e-istojn kaj eltrovis kio movas la movadon. Jen, resume, la motiviĝo por mia filmo: doni forumon kie aŭstraliaj e-istoj povas klarigi kial ili dediĉis grandan parton de sia vivo al la internacia lingvo. Krome, la filmo altiros pli da publika atento al la ideoj kiujn implikas E-o, apenaŭ konata en Aŭstralio.

Ĉu la e-istoj ne estis suspektemaj pri viaj intencoj, tial ke la ĉeffluaj amas-informiloj kutime primokas E-on?

Vi pravas pri ilia mokemo, sed mia celo ne estas nutri tiajn stereotipojn. Mi rakontas historiojn de aŭstralianoj kiuj ial fariĝis E-parolantoj. Kio igis ilin ekparoli ĝin? Kio en E-o kongruas loge kun iliaj ideoj kaj valoroj? Kiajn obstaklojn ili renkontas? Al tiaj demandoj mi serĉas respondojn.

La E-parolantaj aŭstralianoj plejparte montris grandan entuziasmon pri la projekto. Ni interrilatas simbioze, en reciproka fido. Mi volas rakonti ilian historion, kaj ili volas ke ĝi estu rakontita.

Memoru tamen ke mia filmo neniel celas propagandi la E-movadon. En ekvilibra kaj distra maniero mi montras al angle parolanta publiko, kiu tre malmulte scias pri E-o, ties esencon laŭ la perspektivo de kvar aŭstraliaj esperantistoj, la centraj rolantoj: Kep Enderby, Ralph Harry, Jenny Bishop kaj Trevor Steele. Mi esploras ekzemple demandojn kiel: Se Esperanto estas tiel bona ideo, kial oni ne

instruas ĝin en niaj lernejoj? Respondante al tio, mi ilustras gravan problemon kiu malhelpadis E-on tra ĝia tuta ekzisto: ksenofobio, la timo de ĉio nekonata.

Kiel e-istoj impresis vin persone?

Mi alte estimas ilin. Logas min la ideo kerno de internaciaj frateco, interkompreniĝo kaj kompromisemo. Mi ege ŝatas la ideon de neŭtrala lingva forumo egale alirebla por ĉiu homo. En Adelajdo mi bonŝancis vidi la Esperantan idealon funkcii, kiam homoj el pli ol 50 malsamaj kulturoj parolis inter si sen malhelpoj. Mia skipo estis impresita de la pasieco de la homoj. Michael, la kameraisto, pensas ke la lingvo estas eliksiro de eterna juneco!

La filmo parolos angle, ĉu ne?

Plejparte jes, sed multaj kongresaj scenoj estas en E-o; tiujn ni subtitolas. Ni konsideros cirkuligon en aliaj lingvoj, ankaŭ en E-o. La daŭron mi planas 52-minuta. Provizore la filmo titoliĝas "Unu mondo, unu lingvo: la Esperanto-movado en Aŭstralio", kaj estos vendita al unu el du aŭstraliaj dissendantaj, SBS aŭ ABC. Sed unue necesas ke alvenu, eble post ses monatoj, la lasta parto de registara subvencio...

★



Paul Williams
(dua de maldekstre)
paroligas aŭstralian
esperantiston por
sia dokumenta
filmo.

TEATRO

Du ekscitaj aspektoj

Unu jaron post la centjariĝo de la Esperanto-teatro, spektantoj povis delecti sin per la surscena arto de Jadwiga Gibczyńska kaj Vida Jerman.

La dramo *Zamenhof* estis onidire prezentita jam cent fojojn diverse-loke, sed multaj kongresanoj unufoje povis ĝui la legendan aktoradon de Jadwiga Gibczyńska. La teatraĵo penis min pri la graveco de mitfarado en naciaj literaturoj kaj pri la propraj mitoj kiujn ankaŭ Esperantio produktas, pri fondintoj kaj herooj, pri la praaj tempoj ktp. Tio ne signifas ke mito ne enhavas veron, sed ĝi rolas alie: ĝi evoluigas etnan identecon, kunkreas propran kulturon.

(Re)aliĝu al Pasporta Servo

La internacia reto de gastigantoj havis en sia lasta eldono (1996/97) 784 gastigantojn en 68 landoj. Tiu kajero tiom furoris ke ĝi estas nun tute elĉerpita. La kompila teamo de longe laboradas por ĝustatempe produkti novan eldonon, kiu aperu en januaro 1998.

Se vi jam estas gastiganto, vi ricevis respondilon por re-aliĝi. Se vi deziras fariĝi gastiganto, petu aliĝilon de via landa organizanto aŭ de TEJO, plenigu kaj resendu ĝin **nepre antaŭ la 1-a de oktobro 1997** al: Pasporta Servo de TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; ☎+31/10/436-10-44; ✉436-17-51. Reta aliĝo: <lidge@worldaccess.nl>. (Provizora) hejmpaĝo: <http://www.worldaccess.nl/~lidge/paspserv.htm>.

"Optimisma lingvo"

De post la apero de skipo de la tutlanda televida Kanalo 10 en la inaŭguro de la UK, ses radiaj kaj du televidaj stacioj dissendis divers-longajn raportojn pri la kongreso. Aperis du artikoloj en la tutlanda ĵurnalo *The Australian*. Unu el ili, tre longa, baziĝis sur intervjuo kun Kep Enderby kaj Jenny Bishop, kaj nomis Esperanton "optimisma lingvo kiun superfortas la politika povo de la angla". La Adelajda urba informilo *City Messenger* titolpaĝe heroldis la kongreson, kaj la loka gazeto *The Advertiser* ilustris artikolon pri la "pontokonstrua" karaktero de Esperanto per popolkostume bunta foto de kongresanoj.

La 30-an de julio la novaĝ-agentejo Reuters dissendis la artikolon "Esperanto-adeptoj kampanjas al nova erao", laŭ kiu e-istoj "forlasis la esperon igi Esperanton la interkomunika lingvo de la mondo", sed ja klopodas altigi ties internacian akceptatecon, i.a. per Kampanjo 2000. La teksto preskaŭ senŝanĝe aperis, kun alia titolo ("Apogantoj ŝvelparolas Esperanton, okulume al UN") en la internacia

eldono de la ĵurnalo *The New York Times*, la 10-an de aŭgusto.

Cetere, ne longe antaŭ la kongreso, la ĉefartikolo de la magazino *Time* (7 jul.), "Reen al Babelo", pritraktis la mondan multlingvecon kaj la danĝeron de formorto por la plej multaj nun parolataj lingvoj. Inter la grandnombraj reagoj de legantoj en postaj numeroj, du menciis E-on kiel "idealan enkondukon al lingvolernado" (Maire Mullarney, 4 aŭg.) kaj kiel "supernacian helplingvon, kiu ne minacas indiĝenajn lingvojn" (David Coard, 11 aŭg.).

Ago-Tago igu agi

Kiel jam tradicie, la internacia Ago-Tago okazos la 4-an de oktobro, t.e. la unuan sabaton de la monato.

Se en via loko pli konvenas alia proksima tago, elektu tiun; tamen, tutmonda samtempeco de agadoj preferindas, ĉar ĝi povas ŝajni en si mem menciinda al amaskomunikiloj.

Kerno de publika mesaĝo povas esti ekz.: Esperanto poras multkulturis-

mon (aludu la kongresan rezolucion, p. 148); la esperantista movado havas bone difinitajn celojn, rilatajn al la problemoj de la nuntempa mondo (Manifesto de la E-movado, vd. sep. '96, p. 146, aŭ petu de la CO ĝiajn tradukojn en 27 lingvoj); e-istoj povas kunagi sen lingvaj baroj kaj preter landlimoj (ekzemploj abundas, certe ankaŭ en via loka agado).

En Ago-Tago oni ne nur parolu, sed precipe agu. La agad-formoj povas esti plej diversaj, ekde bildkarta ekspozicio ĝis surstrata manifestacio aŭ transdono de peticio. Agad-modelojn vi abunde trovos en raportoj de nia revuo, pleje en la novembro kaj decembra numeroj diversjaraj. Gravas imag-kapablo kaj evito doni sektecan impreson. Esperanto ne solvos ĉiujn lingvajn problemojn, sed ĝi jam solvis iujn por siaj parolantoj.

Ĵurnalistojn interesos aŭdi pri samtempaj, samcelaj okazaĵoj en multaj landoj. Por ekscii pri eventoj alilokaj, unue sciigu mem la Informan Fakon (ĉe la CO de UEA), se eble antaŭ la 20-a de septembro, pri viaj propraj planoj por la Ago-Tago; sendintoj de tia informo ricevos superrigardon pri ĉiuj agadoj anoncittaj. ★

La koncepto fascinas: Zamenhof per la okuloj de tri virinoj. La patrino, maljuna, memoras pri la talenta filo kun fiksa ideo pri artefarita lingvo. La edzino memoras pri la idealisma junulo, pri geedziĝo, infanoj, malriĉo, translokiĝoj, kongresoj, perfidoj, malsano kaj morto de la edzo, stranga hometo kun fiksa ideo pri artefarita lingvo. Lidia Zamenhof en ĉi tiu dramo estas mezaĝa virino, kiu apenaŭ memoras la patron. Kvankam laŭ la biografioj intelektu kaj emocioj ŝi el la gefiloj plej similis la patron, en la teatraĵo ŝi havas preskaŭ nenian rilaton kun li, kaj ŝiaj kontraŭmilita parolado kaj decido reiri al Eŭropo povus esti faritaj de kiu ajn idealisma virino tiutempa.

La dramo pri Ada Sikorska-Fighiera tre similis laŭ atmosfero. Temas pri kuraĝa virino tra- kaj trans-vivinta ĉi-jarcentajn militojn de Eŭropo — sed speciala virino, "unu el ni". La mesaĝo denove estas kontraŭmilita, krio kon-

traŭ subpremo kaj krueleco. Ambaŭ teatraĵoj memorigas — almenaŭ ne-eŭropanon — pri "la frua periodo", kaj ili klare montras ke la naskiĝloko de Esperanto kaj ties idearo, naskitaj meze de la intergentaj malamoj de Orienta Eŭropo, daŭre influas nian komunan subkonscion.

Ion tute alispecan prezentis Vida Jerman. La monodramo *Inventante ke mi sonĝas* temas pri aktorino, ne tiom juna, bela aŭ mensklara kiel je sia karier-pinto, ĵus vekiginta kaj ne tute eldormiginta, iom ebria kaj tro emociema, kies menso vagas inter realo kaj revo. Vida Jerman aktorin kun tiom da vervo kaj emocia forto ke ŝi memorigis pri la itala aktorino Claudia Cardinale siatempe.

La du specoj de teatraĵo montras du aspektojn de la moderna mondkulturo Esperanta. Unuflanke mifaraĵo fortigo de la Esperanta idento etneca, ne komprenata de eksteruloj;

aliflanke entuziasma partopreno en la internacia kulturo de la dudeka jarcento. Ambaŭ aspektoj valoras, ambaŭ aspektoj ekscitas.

Daniel Kane (Aŭstralio)

Noemi, kunkreata

Rimarkindaĵo en nia teatra mondo, kie la kontakton inter aŭtoro, aktoroj kaj publiko regas hazardo: la surscena monologo *Noemi* estis verkita de Paul Gubbins eksplicite por Jadwiga Główna, kaj ĝia presota teksto definitiviĝos nur post ŝia "testludado". En saloneto sen podio Główna rolis maljunulinon kiu, multe suferinte dum dura vivo (ĉefe pro totalisma reĝimo), finfine trovis ekvilibron kaj pacon en sia trankvila, kampara ekzisto, se tiu ne estus minacata de nova ŝoseo konstruota tra ŝia fora, belnatura valetto. Malgraŭ ĉio, interna forto ebligas al ŝi defii la detruantojn. ★

Ni bezonas novan etoson

Fermantoj de Universala Kongreso estas kutime pli lacaj kaj malpli viglaj ol ĝiaj inaŭgurantoj — sed nepre ankaŭ pli riĉaj: je unu semajno da intensa vivo en Esperantujo.

En ĉi tiu sabat-matena adiaŭo — kiun tamen por multaj sekvis ekveturo al diversaj postkongresaj vojaĝoj — sur la podio aperis UEA-estraranoj LEE Chong-Yeong, Michela Lipari, Renée Triolle kaj Povilas Jegorovas; ĝenerala direktoro Osmo

La kolokvo traktis kiel oni kohere kunligu tri agadŝtupojn: instruadon de Esperanto, sciencajn eksperimentojn ĉi-rilatajn, kaj ĝeneralajn studojn pri lingvoinstruado. Oni konkludis ke malplej fortas la dua ŝtupo. Estas planata daŭriga seminario en Mont-

peliero pri lingvopolitiko kaj interkultura edukado, laŭespere en la kadro de la Unesko-projekto Linguapax.


Osmo Buller anoncis pri Belartaj Konkursoj, kaj Jenny Bishop, estro de la Gazetara Servo, resumis ties laborrezultojn (vd. "Informado", p. 151).

Trevor Steele, kunordiginto de la kongresa temo, konkludis ke, malgraŭ la monda vastiĝo de multkultureco, oftas kaj plu fortas diskriminacio, ĉar antaŭjuĝoj baziĝas sur eternaj homaj ecoj: timo perdi siajn privilegiojn, kaj la malimagama inklino pensi per kliŝoj. Tamen videblas esperigaj signoj de pli bona pensmaniero, el kiuj unu estas la uzado de nia lingvo. Kep Enderby laŭtlegis la rilatan rezolucion.

Por muzike ripozigi la orelojn, Aldo Fiorentin omaĝis al la 200-jara jubileo de komponisto Gaetano Donizetti pianante pecon trafe elektitan: "La foriro".

Renée Triolle transdonis Trofeon Fyne, Povilas Jegorovas anoncis aljuĝon de sumoj el Subvencio Cigno kaj Fondaĵo Saliko, Pasquale Zapelli laŭtlegis la nomojn de premiitoj de Fondaĵo Grabowski, kaj LEE Chong-Yeong enmanigis Premion Deguchi. (Vd. malsupre.)

Osmo Buller voĉigis saluton de Honora Membro Hugo Röllinger, aŭtoro



LKK-estro en 1998, Claude Nourmont (maldekstre) transprenis la kongresan flagon de kolego Kep Enderby.

Buller, CO-direktoro Pasquale Zapelli, LKK-estro Kep Enderby kaj la rektoro de Internacia Kongresa Universitato, Ronald C. Gates.

Ĝenerala sekretario Lipari anoncis ke la kongreso iusence havis pliajn milojn da partoprenantoj, dank' al Pola Radio kaj Interreto: ĉi tiu estis la unua UK daŭre sekvebla ankaŭ per komputila ligiĝo. Da eventoj ŝi statistikis: 146 oficialajn erojn kaj dekojn da neoficialaj; 15 teatraĵojn kaj koncertojn; 14 prelegojn; kaj, plej impone, 1300 ekskurs-partoprenojn! Alivorte, averaĝa kongresano aliĝis al organizita ekskurso pli ol unu fojon.

Rektoro Gates raportis pri IKU-sesio kiu povis fieri ne nur pri cento da aŭskultantoj en preskaŭ ĉiu prelego, sed krome pri centoj da aĉetintoj de la akompana preleg-kajero.

Renée Triolle klarigis ke la Esperantologia Konferenco ĉi-jare alprenis la formon de kolokvo pri propedeŭtiko, kun partopreno de neesperantistaj lingvistoj kiel Peter Mühlhäusler.

Premioj:

Trofeo Fyne

Aljuĝata de UEA en ĉiu dua jaro, ekde 1975, al tiu landa asocio (kun pli ol 150 membroj) en kies lando la pasintaj du jaroj vidis la plej grandan proporcian kreskon de la individua membraro de UEA, aŭ kiu alimaniere grave kontribuis al la progreso de UEA. **Brazila E-Ligo** estas la unua asocio kiu ricevas la trofeon duan fojon, pro la okulfrapa plinombrigo de la individuaj UEA-membroj — kresko de 344 al 525, t.e. 53%, inter 1994 kaj 1996. Brazilo estas ankaŭ la unua lando kiu havas jam pli da delegitoj ol antaŭ la pasintjara reformo de la Delegita Reto. BEL povas krome fieri pri la bela revuo *Brazila Esperantisto*, pri bona libroservo kaj amasaj landaj kongresoj.

Premio Grabowski

Iniciatita de Adam Goralski, Fondaĵo Grabowski subtenas la Esperantan kulturon, precipe beletron, per premioj kaj subvencioj. Ĉi-jare ĝia juĝkomisiono premiis la verkistojn **Trevor Steele** (Aŭstralio), per 650 usonaj dolaroj, **GBEGLO Koffi** (Togolando) kaj **MAO Zifu** (Ĉinio), per po 250 dolaroj, kaj la revuon **Litova Stelo** per 150 dolaroj.

Subvencio Cigno

Apogas agadojn en la tria mondo kaj Orienta Eŭropo, el sumo ĉiujare donacata, ekde 1994, de japana mecenato. **Kuba E-Asocio** ricevis subvencion de 8750 gld. por modernigi sian oficejan ilaron kaj tiun de la Esperanta Redakcio de Radio Havano.

de *Monumente pri Esperanto*, “la ZEO-libro”, kiu fariĝis pli furora ene de kvar monatoj ol eĉ la bildstri-albumoj Asteriksaj.

LKK-estro Kep Enderby juĝis la kongreson “tute profitdona” por aŭstralianoj, “en la movada senco”. Li dankis ĉiujn kunrealigintojn de la kongresa programo kaj la LKK-membrojn, kiuj invadis la scenejon en tiel densaj vicoj ke oni povis timi malpleniĝon de la spekteto. Fine Enderby transdonis la kongresan flagon al Claude Nourmont, kiu heredis lian malfacilan taskon por la 83-a UK en Montpeliero.

En sia kongresfina parolado prezidanto LEE Chong-Yeong avertis ke ni ankoraŭ malmulte sukcesis disvastigi Esperanton, kaj eĉ pli malmulte sukcesis utiligi ĝin en internaciaj komunumoj ekster niaj rondoj. Tial ni bezonas novan etoson por igi nian movadon “antaŭenema” — etoson kies bazon kreis la Manifesto de Prago kaj kiun stimulas Kampanjo 2000, bazdokumente aprobita de la Komitato en Adelajdo.

Kiel ĉiam en la pasintaj 92 jaroj, “La espero” sonis ĝuste tiel antaŭenema el la kongresanaj buŝoj.

István Ertl

Premio Deguchi

Financata de la japana religia movado Oomoto kaj ĉiujare aljuĝata de UEA al individuo aŭ institucio pro kontribuo al plifirmigo de internacia amikeco. Ĝia diplomo, kun sumo de 4000 gld., iris en 1997 al Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, pli bone konata kiel **Kastelo Grésillon**.

Fondaĵo Saliko

Celas progresigi la instruadon de Esperanto, i.a. per kreo de modernaj instruiloj. Ĝian kapitalon donacis la gefiloj de Edith kaj August Weide, memore al siaj gepatroj. E-Ligo de Norda Ameriko ricevis el ĝi 20 000 gld. por la **vidbenda lecionaro Esperanto, pasporto al la tuta mondo**, kiun UEA aŭspicias.

Kongreseroj koncize

Ameriko: Refortiĝo en la Centro

En publika kunsido de la Komisiono pri amerika agado, komisiito Atilio Orellana Rojas raportis pri lastjaraj atingoj. Elstaras la kreo, fare de James Rezende Piton (Brazilo), de TTT-paĝo pri Esperanto en Ameriko kaj pri la agado de la komisiono, kun kalendaro de eventoj, adresoj de kluboj ktp. Oni decidis subvencii vojaĝon de junulo al la sekva UK, eldoni la revuon *Esperanto en Ameriko*, kaj instigi ĝemeligojn de kluboj/asocioj. Menciindas refortiĝo de la agado en Centra Ameriko, nome Kostariko, Nikaragvo, Panamo kaj Salvadoro.

Amikeco: Kiel revigligi SIA?

La komisiito de UEA pri Semajno de Internacia Amikeco, Edvige Tantin Ackermann, celas reaktivigon de SIA. En kunveno ŝi instigis E-grupojn al interesaj aktivaĵoj kun internacia enhavo dum SIA, kies dato estas la lasta plena semajno februara de lundo ĝis dimanĉo — sed eblas, se necese, okazigi ĝin krome en aliaj periodoj.

Astronomio: Wandel Mars-misias

Amri Wandel improvizis prelegon, laŭ sugesto de LKK, pri la usona spacmisio al Marso, el kiu venis freŝaj bildoj dum la UK. Pli ol 50 aŭskultantoj plenŝtopis etan salonon, kaj la planita 15-minuta daŭro triobligis pro la interesiĝo kaj la multaj demandoj.

Etnistoj: Gravas lingvoplanado

En la kunveno de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, faka asocio defendanta la rajtojn de la etnaj minoritatoj, IKEL-vicprezidanto Daniele Vitali prelegis pri “La graveco de lingvopolitiko kaj lingvoplanado por savi la minoritatajn lingvojn”. Li montris kiel ĉe-tabla planado grave rolis en la evoluo de multegaj lingvoj nun oficialaj, kiel la novhebrea, novnorvega, estona, rumana, taĝika, kirgiza ktp. Krome, lingvoplanado influis la hodiaŭan aspekton de multaj pliaj lingvoj. Ĉio ĉi pravas la gravecon de lingvoplanado en ĉiuj kampoj de la homa komunikado.

Faka Forumo: Spaco kaj tempo

En la Faka Forumo, spert-interŝanĝejo establita pasint-UK-e, 15-20 personoj prezentis dekon da fakaj asocioj (FA-j), i.a. fervojistojn, medicinistojn, ĵurnalistojn, skoltojn, Amikaron de Bruno Gröning kaj sciencistojn. Amri Wandel parolis pri la servoj de UEA al la FA-j. Li elstarigis la rolon de FA-j en Kampanjo 2000 kaj “fakaj eksteraj rilatojn” — kontaktojn kun internaciaj organizaĵoj surbaze de komunaj fakaj interesoj. Oni laŭdis la lastatempan fakan agadon de UEA kaj petis pli da spaco en la revuo kaj pli da tempo por la Faka Forumo en Montpeliero. (A. Wandel)

Interreto: Kongresi virtuale

En Prago Mark Fettes esprimis la deziron ke tiu estu la lasta UK sen komputilreta ligo. Lia deziro plenumiĝis: en Adelajdo estis aliro al retpoŝto kaj, precipe, eblis kongresi virtuale dank’al la kuriero *La lumilo*, kies ĉiu numero eniris baldaŭ post pretiĝo la hejm-paĝaron de Aŭstralia Esperanto-Asocio (<http://www.esperanto.org.au>) kaj, dank’ al PEJNO Simono, tiun de Pola Radio (<http://ourworld.compuserve.com/homepages/simono/polrad.htm>). Ĉi lasta estis vizitita dum la UK preskaŭ 300 fojojn kaj — post kompletigo per la preleg-tekstoj de IKU — pluajn 200 fojojn ĝis la 21-a de aŭgusto.

Juro: Nova revuo

Jardekon post la ĉeso de *Internacia Jura Revuo*, en Adelajdo estis lanĉita *Jura Tribuno Internacia*, organo de Esperanta Jura Asocio. Ĝi aperos unufoje jare kun helpo de Andaluzia E-Unuigo, sub redakto de José María Rodríguez. La unua numero, preskaŭ 100-paĝa, enhavas i.a. artikolojn de Anna Ritamäki pri rajtoj de minoritatoj, Kep Enderby pri la leĝa situacio de aborigenoj en Aŭstralio, Rafaela Urueña pri la lingva reĝimo de Eŭropa Unio kaj de la redaktoro pri la rajto je memdecido en Orienta Timoro. TTT-paĝo de la revuo: <http://www.geocities.com/Acropolis/7009>.

Jurnalistoj: Financa respiro

Kolektiĝis nur 6 membroj de Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio (TEĴA), en frapa kontrasto kun membrokunsidoj en eŭropaj UK-j, kiuj plenigas grandan ĉambron. Jen kio montras ke “la tutmondeco gurdita de eŭropanoj estas nur hipokrita litanio” — laŭ sekretario YAMASAKI Seikô, kiu raportis pri financa resaniĝo de TEĴA post la drastaj ŝparoj deciditaj en Prago, i.a. eldoni jare triaŭ kvarfojan cirkuleron anstataŭ la kvaronjara, 32-paĝa revuo *Internacia Ĵurnalisto* — perdo kiun kompensas duonigo de la kotizo. Nun pro la financa respiro ebligis eldoni TEĴA-almanakon, kiun redaktas prezidanto Stefan Maul.

Prelegoj: En nebuloj

Kongresano konsciigas dum kunvido: “Mi sentas min kvazaŭ en aviadilo; dum mi dormetas mi aŭdas konstantan brueton, vekiginte mi vidas ĉiam la samajn personojn, rigardante al la fenestro mi tute ne povas diveni en kiu parto de la tago mi fakte estas.” *La lumilo* avertis ĉi tiun suferanton de horzonozo: “Atentu, amiko, ni jam estas meze de la kongreso, la aviadilo flugas reen!”

Radio: Reagoj bezonataj

La komisiito de UEA pri radio-aferoj, Andrzej Pettyn, gvidis kunvenon de radio-aŭskultantoj kaj -redaktoroj. Pri la internaciaj E-elsendoj en Aŭstrio, Ĉinio kaj Kubo kaj pri la stacio 3ZZZ en Melbourne informis ties redaktoroj. Refoje evidentiĝis ke por al-eksterlandaj programoj de ŝtataj radiostacioj tre gravas skribaj reagoj, kiuj montras ke la elsendoj estas bezonataj. Oni konstatis ke pli vastan subtenon meritas Amikaro de Esperanto en Radio, kiu liveras kun ekzemplodona fidindeco aktualajn informojn pri E-radioelsendoj kaj kreas modelajn datum-bazojn konstante aktualigatajn.

Ĉe la Pekina kaj Varsovia radioj aŭdeblas eĉ post aŭgusto amaso da intervjuoj kaj raportoj el Adelajdo.

Religio: Diservo, diverso

Reprezentantoj de bahaismo, budhismo, hinduismo, homaranismo, islamismo, judismo, kristanismo, kriŝnismo, Oomoto, sikismo kaj zoroastrismo estis invititaj al kiel eble plej interreligia diservo dimanĉe, en kristana preĝejo. En la tre simpla ceremonio adeptoj de la diversaj kredoj mallonge legis aŭ citis el siaj sanktaj verkoj aŭ vortigis propran preĝon.

Vespere de la ekskursita tago, la sud-aŭstraliaj bahaanoj aranĝis akcepton por kongresanoj, cele al neformala konatiĝo. La feston malfermis Kep Enderby.

Sonbendoj: Tujaj sonoj

La sonbenda servo de la kongreso funkciis eksterordinare rapide: sonregistroj de 37 kongreseroj estis aĉeteblaj ofte jam kelkajn minutojn post la koncerna programero.

ZEO: Kvina pac-ginko plantita

De kelkaj jaroj aŭstraliaj e-istoj plantas pacarbon okaze de siaj kongresoj kaj somerkursaroj. (Unu tia arbo videblas sur la kovrilo de nia n-ro 1059, majo 1994.) Dum la kongresa ĵaŭdo, en la parko Pennington Gardens, kongresanoj plantis pluan arbon. Nun en la parkoj de Adelajdo troveblas kvin vivantaj Zamenhof/Esperanto-objektoj: ĉiuj estas ginkoj.



Kat-amantoj: Pli trafan temon!

La kunvenon de Rondo Kato, amikaro prezidata de Marjorie Boulton, ĉeestis 17 homoj el 8 landoj. Oni konsentis ke renkontiĝi por nur diskonigi la nomon de siaj bestoj ne utilas kaj tro kostas; estontece oni pritraktu temon interesan (ekz. konduto kaj sanproblemoj de katoj aŭ leĝa protektado diverslanda) kaj oni trovu en la membraro best-kuraciston pretan helpi aliajn rondanojn per sugestoj kaj konsiloj. (E. Tantin Ackermann)

Kuriero: Tutgloba Lumilo

Aperinta kvin fojojn sub la redakto de Bob Felby, *La lumilo* estis asidue legata ankaŭ post la UK. (Vd. “Interreto”). Ĝi bone plenumis sian rolon de korektilo al la Kongresa Libro kaj de orientilo programa, turisma, eĉ kleriga. Ni dankas al *La lumilo* pro la informoj kiujn ni transprenis el ĝi, precipe ĉi-rubrike.

Lingvo: Eks pri “krokodili”


Laŭ ies sugesto, en Aŭstralio oni ne “krokodilas”. Oni prefere “kangu-ruas” — saltadas de lingvo al lingvo.



Verkistoj: Solecaj sidadoj en angulo

La kvinan sinsekvan fojon en UK, Esperantaj aŭtoroj renkontis en angulo de la Libroservo siajn legantojn kaj aŭtografis volumojn. Bedaŭrinde, la publiketo konsistis foje el malpli ol manpleno da homoj. Tamen, la kongresa kroniko registras: Gilbert Ledon, Harald Schicke, Trevor Steele, Spomenka Štimec (sur la bildo) kaj Amri Wandel sidis publik-pretaj. Je kroma okazo arigis la prelegantoj de IKU, por aŭtografi la broŝuron kun siaj referaĵoj.

Laste aperis



Aminda. Leendert C. Deij (1919). Prilly: LF-koop, 1997. 103p. ISBN 3 906595 11 0. 21cm. Rakonto pri la lingva evoluo de imagita denaskulino, bazita sur aŭtoraj observoj pri la propra filo nederland-lingva. 33,00 gld.

Antologio de kroataj unuaktaj dramoj. Komp. Branko Hećimović. Red. Spomenka Štimec. El la kroata trad. L. Borčić, I. Boro-večki, K. Dahmann, Z. Flego, M. Mamužić, Z. Tišljar. Zagreb: Kroatia E-Ligo, 1997. 211p. ISBN 953 96918 0 X. 25cm. Dek unuaktaĵoj ekde la 16-a jc. ĝis la nuntempo. 34,80 gld.

Diaj vojsignoj. DEGUĈI Onisaburo (1871-1948). El la japana trad. MAEDA Ŝigeki. Kameoka: Oomoto, 1997. 26+174p. ISBN 4 924501 01 8 C. 22cm. Bind. Unu el la sanktaj libroj de la religio Oomoto, verkita de ĝia kunfondinto. Kun ampleksa klariga artikolo. 36,00 gld.

Dicionário completo Esperanto-português. Allan Kardec Afonso Costa (1914). Rio de Janeiro: Federação Espírita Brasileira [1997]. 32+533p. ISBN 85 7328 101 4. 23cm. Esperanta-portugala vortaro kun 15 miloj da kapvortoj kaj multaj ekzemplofrazoj. 54,00 gld.

Ekstremoj. Novelaro. Miguel Fernández (1950), Jorge Camacho (1966), Gonçalves Neves (1964), Liven Dek (1950). Viena: IEM, 1997. 207p. ISBN 3 901752 10 2. 23cm. La "ibera kvaropo" verkis 28 novelojn laŭ ok antaŭdifinitaj temoj iel ekstremaj: aidoso, amo trans morto, malfidelo, seksa memkontentiĝo, sinmortigo, toleremo, unua amora sperto, kaj venĝo. 27,00 gld.

Esperanta-rusa vortaro / Slovar esperanto-russkij. Aleksandr Korĵenkov (1958). Jakaterinburg: Ruslanda Esperantisto, 1997. 30p. 20cm. Ĉ. 2000 kapvortoj, por kursoj de komencantoj. 4,80 gld.

Fervojaj terminaroj. UIC railway dictionary. IFEF Terminara Komisiono. Budapest: Magyar Államvasutak Rt., 1997. 21cm. Bind. La pli ol 8000 terminoj de la ĝenerala terminaro de Internacia Fervoja Unio, ambaŭdirekte, po unu volumo en 13 lingvoj. Po 39,00 gld.:



E-angla / angla-E. 355p.
E-ĉeĥa / ĉeĥa-E. 328p.
E-dana / dana-E. 434p.
E-franca / franca-E. 360p.
E-germana / germana-E. 434p.
E-hispana / hispana-E. 386p.
E-hungara / hungara-E. 346p.
E-itala / itala-E. 366p.
E-nederlanda / nederlanda-E. 393p.
E-pola / pola-E. 373p.
E-portugala / portugala-E. 384p.
E-rumana / rumana-E. 338p.
E-sveda / sveda-E. 434p.

Gemverkoj de Higuĉi Iĉijou (1872-96). El la japana trad. OTSUKA Eizo. Osaka: Ekscitono Esperanta, 1997. 110p. 21cm. Kvar rakontoj (1894-96) de eksterlande ne sufiĉe konata klasikulino. 18,00 gld.

Hohokamaj fantomoj. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1994. 23p. 22cm. Novelo pri mistera apero de forpasintaj indianoj ĉe muzea aranĝo. 4,80 gld.

Important Esperanto research with references. Facts to promote the International Language. Wesley E. Arnold. Warren: la aŭtoro, 1996. 91p. ISBN 0 915935 14 7. 22cm. Anglalingva. Kolekto de argumentoj kaj donitaĵoj por informi pri Esperanto. Kun 30-paĝa kompara tabelo pri la ofteco de pli ol 1000 E-radikoj. 18,00 gld.

Karnavale. Maskita rakonto. Abel Montagut (1953). Viena: IEM, 1997. 65p. ISBN



Neologisma glosaro. Eta postrikolto al PIV. Henri Vatré (1908). Saarbrücken: Iltis, 1997 (4-a eld.). 87p. ISBN 3 932807 01 4. 21cm. 2000 vortoj ne registritaj en PIV, kun laŭ-tema klasifiko kaj suplementa rimaro. Neŝanĝita kompare kun la 3-a eldono. 28,50 gld.

Novo dicionário português-Esperanto. Allan Kardec Afonso Costa (1914). Brasília: Federação Espírita Brasileira [1994] (3-a eld.). 544p. 23cm. Moderna, ampleksa vortaro portugala-Esperanta kun multaj esprimoj kaj ekzemplofrazoj. 48,00 gld.

Patro nia (1952). Diktita de la Spirito Meimei. Francisco Cândido Xavier. Desegnaĵoj de Joel Linck. El la portugala trad. Afonso Soares. Rio de Janeiro: SES F. V. Lorenz, 1997 (neindikita). 96 (nenumeritaj) p. ISBN 85 7328 026 3. 26cm. Koloraj bildoj. Ilustro de la instruoj de kristanismo per rakontoj kaj poemoj. 27,90 gld.

Trans la seĝo. Kvardek noveloj elektitaj. Miklós Tóth-Máthé (1936). El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: Méliusz TMM Bt, 1997. 184p. ISBN 963 85741 1 9. 20cm. Seriozaj kaj satiraj verkoj, bibliaj parafrazoj kaj personaj "memor-noveloj", kiujn la aŭtoro mem elektis por ĉi tiu Esperanta kolekto. 21,60 gld.

Internacia E-Muzeo, kiu daŭrigas la eldonagadon de Pro Esperanto, publikigis iberiajn aŭtorojn en Viena.

3 901752 09 9. 23cm. Forme varia, poezia priskribo de "senzorga maskerado" en Katalunio, kiu alegorias memvolan forlason de la propra lingvo. 20,10 gld.

Kiel ĉiuj katetoj. Agnieszka Usakiewicz. Ilustris Aleksander Oczko. El la pola trad. Wojciech Usakiewicz. Bielsko-Biala: KLEKS, 1993. 64p. ISBN 83 85159 81 9. 26cm. Plenkolora presita. Bind. Ok rakontoj pri urseto, hundeto, talpido kaj aliaj bestoj, kiuj kondukas ofte rimarkinde simile al infanoj. 24,00 gld.

Ludovikologia dokumentaro XXV. Invito al la ludovikologio. Volumoj I kaj II. Red. Ludovikito (1918). Kioto: Ludovikito, 1997. 326p resp. 347p. 22cm. Kleraj "postbabiloj" al la volumoj aperintaj ĝis 1989 resp. ekde 1989. Po 72,00 gld.

Matenmanĝo ĉe la cirko. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1996. 22p. 22cm. Aventuro de knabeto ĉe cirko dum la nasko de fratino. 4,80 gld.

Murdo en la preĝejo. Edwin Grobe (1927). Tempe: Arizona Stelo, 1995. 31p. 22cm. Krim-novelo. 8,70 gld.

DIVERSAĴOJ

Filatelajoj: Poŝtmarko: Unua Kongreso de Kroataj E-istoj. Zagreb: HPT, 1997. Plurkolora poŝtmarko kun portreto de Zamenhof kaj verda stelo. 3,00 gld.

Unuataga folio: Unua Kongreso de Kroataj E-istoj. Zagreb: HPT, 1997. 14x21cm. Speciala unuataga folio kun surgluita kaj stampita poŝtmarko, kun dorsflanka teksto en la kroata kaj franca. 6,00 gld.

Unuataga koverto: Unua Kongreso de Kroataj E-istoj. Zagreb: HPT, 1997. Koverto kun desegnita portreto de Zamenhof; poŝtmarko stampita. 4,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskaj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Assisi: ĉu nova perspektivo?

La 53-a Internacia Junulara Kongreso en Assisi (Italio, 24-31 julio), kun sia kvincento da partoprenantoj el 30 landoj, donas novan energion al la plej grava junulara renkontiĝo, kies movadan signifon dum la lastaj jaroj kelkaj komencis demandosigni.

Nur iomete malpli ol 500 homoj partoprenis la junularan kongreson, kiu montriĝis la sepa plej granda en la historio de ĉiuj IJK-j kaj la plej vizitata de post 1989. La plej multaj kongresanoj foriris kontentaj el plurkiale memorinda aranĝo.

Centra Italio estas en si mem garantio por eksterordinara etoso, kiun la partoprenantoj povis plene ĝui dum la multaj ekskursoj, promenadoj kaj vizitoj. La urbo Assisi estis celo de konstanta pilgrimado, organizita aŭ ne, de

buntaj rondoj de kongresanoj. Buntis ankaŭ la urbo, pro la centoj da pri-kongresaj afiŝoj ĉie pendigitaj. Jen kio klarigas — krom la konstanta kaj efika informado de la amaskomunikiloj — ke dekoj da homoj el la tuta regiono vizitis la vesperajn programojn, el kiuj pluraj estis vere altkvalitaj, ekz. monda premiero de Esperanta muzikalo pri la vivo de Sankta Francisko.

La organizantoj certe fieras pri la programo, kiu konstante, de la 9-a matene ĝis la 2-a nokte, ebligis elekti

inter 5-6 eroj samtempaj: dekoj da prelegoj pri la kongrestemo “La homo. Ĉu super aŭ parto de la naturo?”, laborgrupoj kaj seminarioj donis plurajn eblojn al tiuj multaj kiuj celas ankaŭ labori kaj produkti en kongreso.

Dum oni ne povas ne observi la ĉiam plian tendencon ke en junularaj aranĝoj la partoprenantoj taksas pli gravajn distraĵojn ol “seriozajn” aspektojn de la programo (bonan diskotekon pli ol trafajn pritemajn aranĝojn), rimarkeblas ankaŭ ke pli kaj pli da homoj ekgrumbas kontraŭ tiu negativa fenomeno. Ĉu ilia reago donas novan perspektivon al junularaj kongresoj? Ĉu la 53-a IJK en Assisi povos esti modelo por organizantoj de venontaj junularaj aranĝoj, renversante la tendencon?

Francesco Amerio (Italio)

Tutmondeco kaj kotiza justo

Elektio de nova estraro, diskutoj pri kotiz-politiko, pri trejnado kaj multo plia — ne mankis laboro por la Komitato de TEJO.

Denove kreskis la nombro de landaj sekcioj de TEJO, per la akcepto de Rumana E-ista Junulara Asocio kaj Ukrainia Ligo E-ista Junulara.

Novaĵo: dum la komitatkunsido ĉeestis reprezentanto de Eŭropa Junulara Forumo, nova tut-eŭropa junulara strukturo, kiu per tiu deleĝo agnoskis la pozicion de TEJO en sia sino. Dank’ al subteno de TEJO, ĉeestis ankaŭ Ewa Krach (Pola Radio), kies surlokaĵaj intervjuoj nutros plurajn elsendojn el Varsovio.

Laborgrupo pri nova strukturo de la estraro, kun la celo pli tutmondigi la agadon, konkludis ke pli ol nova strukturo necesas trejni ekstereŭropajn aktivulojn, sen altrudi eŭropajn pensmanierojn, organizajn strukturojn ktp.

Unu jaron post la UEA-Komitata



La Komitato de TEJO, inkluzive (kun TEJO-Tĉemizoj) parton de la nova estraro

rekomendo de la Manifesto de Prago, nun ankaŭ TEJO subskribis ĝin.

Ardaĵaj diskutoj temis pri la “50%-a regulo”, laŭ kiu t.n. B-landanoj pagas kiel kongresano kotizon duonon de la sumo difinita por A-landanoj. Komisiono provos rekomendi justan kaj uzeblan solvon dum la venonta IJK.

Multajn surprizoj la decido fermi la eŭropan oficejon de TEJO en Bonn. La laboro kiun faris BonEJO estos daŭrigata de plentempa volontulo aŭ eĉ dungito en la Centra Oficejo, kunlabore kun estraranoj kaj komisiitoj.

Laŭ raporto de Sjoerd Bosga, estrarano de TEJO pri informado

Estrararo de TEJO 1997-99

Prezidanto: Joseph Truong, Usono

Vicprezidantoj: Jimmy Stryhn Meyer, Danio/Luksemburgio (eksteraj rilatoj), Miquel Gómez i Besòs, Hispanio/Germanio (kongresoj), Reza Torabi, Irano

Ĝenerala sekretario: Jeroen Balkenende, Nederlando

Kasisto: Pascal Lécaille, Francio (landa agado)

Estraranoj: Attila Kaszás, Hungario (aktiva trejnado), Sjoerd Bosga, Nederlando (informado)

Esperanto, ĉu propedeŭtiko al multkultureco?

Krom la temo "Multkultureco kaj lingvolernado", aktualaĵoj de la E-instruista mondo kaj de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj estis traktataj en la kongresa Tago de la Lernejo kaj en la 31-a ILEI-konferenco (apud Geelong, ŝtato Viktorio, 27 jul. - 2 aŭg.).

Tago de la Lernejo

La nur duhoran programon ĉeestis ĉ. 40 kongresanoj. Enkonduke Atilio Orellana Rojas laŭtlegis kongresman artikolon de prof. Duncan Charters, prezidanto de ILEI (legeblan en *Internacia Pedagogia Revuo*, 1997/2). Jennifer R. Bishop raportis pri la disvolviĝanta projekto EKPAROLI (Esp^{er}anto kiel propedeŭtiko al rapidigo de orientlingvo-lernado kaj instruado; vd. majo '96, p. 92), kies lulilo estas en Melburno. Ilustre pri la tiea laboro, infana grupo el la lernejo Carrum kantis kaj prezentis scenojn el la Mazi-filmo, sur kiu baziĝas ilia lernado. Pri la nuna stato de la Mazi-materialo kaj ties dissendado en la pola televido (vd. dec. '96, p. 203) raportis Roman Dobrzyński. La aŭstralian edukistemon kaj ties lingvopolitikon prezentis Alan Bishop, profesoro de Universitato Monash en Melburno. Fine, la ĉeestantoj spektis malneton de la kvar jam filmitaj unuoj de nova instrufilmo, la rektmetoda *Esperanto, pasporto al la tuta mondo*, kiu ekpretiĝis en San-Francisko laŭ scenaro de Paul Gubbins (aŭtoro de la sukcesa lernolibro *Kunvojaĝu*). Fondaĵo Saliko de UEA subtenas la projekton per 20 000 gld., sed pluaj financaj kontribuoj estas bonvenaj.

Cseh-kurso kaj -seminario

Kadre de la tradiciaj aranĝoj de Internacia E-Instituto, gvidataj de Katalin Smidélusz, 8 personoj (el 8 landoj de 4 kontinentoj) studis seminarie la faman Cseh-metodon kaj observis paralelan Cseh-kurson por komen-cantoj. Ĉi tiun regule frekventis ĉ. 15 lernantoj, sed pliaj 25 venis por unu aŭ du tagoj. En la fino la seminarianoj pruvis per 5-minutaj prov-instruadoj ke ili kapablas apliki kelkajn el la bazaj teknikeroj de la metodo.

La 31-a ILEI-konferenco

Partoprenis 28 personoj (kelkaj parte) el 15 landoj de 4 kontinentoj.

Post voĉlegitaj mesaĝoj de prezidanto Duncan Charters kaj de Stefan Mac-Gill (kiu raportis pri 47%-a kresko

abonantara por la revuo *Juna Amiko*), oni rememoris la forpasintajn fidelajn kunlaborintojn Catina Dazzini kaj Marin Bacev.

Marcel Leereveld parolis pri la simboloj kiujn li inventis por reprezenti la gramatikajn regulojn per figuroj, koloroj k.s. Jennifer Bishop montris la progresojn de EKPAROLI. Doroteo Holland prezentis parton de la menciita usona videokurso. Trevor Steele rakontis pri la malfacilo instrui la anglan lingvon al aborigenoj, ĉe kiuj preskaŭ ĉiu grupo havas lingvon propran. La konferenca temo, enkondu-kita de Leereveld, vekis reagojn kaj rakontojn pri spertoj en propra lando.

La komitato traktis i.a. la jarraporton kaj finanĉan raporton pri 1996, la tri-jaran strategian planon de ILEI, la statuton kaj internan regularon. Montriĝis ke la registriĝo de la statuto en San-Marino ne plu validas; oni decidis registri ĝin en Nederlando. La komitato aprobis la elektoregularon, post kelkaj modifoj. La estraro estis komisiita

elabori laborplanon por 1998 surbaze de la trijara strategia plano.

Du Honoraj Membroj estis nomumitaj: Charlotte Kohrs el Usono, kiu kunfondis la organizaĵon "Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo", kaj la 93-jara Idyss Einihovici el Aŭstralio, pro sia multjara Esperanto-instruado. Honore al Mario kaj Catina Dazzini, la konferenca kaso, kies donacoj ekde 1996 ebligas al membroj el nepagipovaj landoj partopreni ILEI-konferencojn, ricevis la nomon Dazzini.

En UEA/ILEI-ekzameno sukcesis unu kandidato, je la meza nivelo.

Kultura kulmino estis la varme aplaudata surscenigo de la romano *La lastaj infanoj de Oldrovalo* de Gudrun Pausewang, sub la titolo *Ĉu la nepoj nin benos?*, fare de Jadwiga Gibczyńska.

La sekvonta ILEI-konferenco okazos en Montpeliero, de la 8-a ĝis la 14-a de aŭgusto 1998, tuj post la 83-a Universala Kongreso.

Laŭ La Lumilo kaj raporto de Hans ten Hagen



Muzea festo en Francio

Louis L.C. Zaleski-Zamenhof (maldekstre) alvenas al la dudekjariĝa festo (26-27 apr.) de la Nacia Esperanto-Muzeo en Gray (Francio), ĉeestata de 200 personoj. (Vd. ankaŭ la internan dorskovrilon.) La direktoro, Géo Junier (dekstre), akceptis entute tri nepojn de famaj E-pioniroj: Louis Zaleski-Zamenhof, Henri Bastien kaj Charles-Carlo Bourlet. (R. Triolle)

Fervojfaka fervoro terminara

Slovakaj fervojistaj e-istoj aranĝis la 49-an kongreson de Internacia Fervojista E-Federacio (IFEF) en Košice (10-17 majo), por 197 venintoj el 23 landoj — la plej malmultaj de post la unua IFEF-kongreso en 1949.

Post ekumena diservo, en la solena inaŭguro salutis la kongreson reprezentantoj de urbaj kaj fervojaj instancoj, i.a. — en perfekte prononcata Esperanto — Jakob Tschanz nome de FISAIC, la fervojista kultura kaj liber-tempa organizaĵo internacia. La prezidanto de IFEF, Per Engen, emfazis en sia festparolo du gravajn rezultojn de la lasta tempo: la akcepton de Esperanto kiel tria laborlingvo de FISAIC kaj ĝian oficialigon kiel unu el la lingvoj de *RailLexic*, la fakterminaro de Internacia Fervoja Unio (UIC).

Ĝuste ĉi-rilate, hungaraj IFEF-anoj alportis la imponegan volumaron de *Fervoja terminaro* en 13 lingvoj ("Laste aperis", p. 155), bazita sur la dua, kompaktdiska eldono de *RailLexic*. Hungaraj ŝtatfervojoj presis kaj eldonis ĝin — kunlabore kun Hungara Fervojista E-Asocio — dank' al instigo de IFEF-vicprezidanto István Gulyás.

La du ĉefaj fakprelegoj temis pri la pasinteco kaj nuno de slovakiaj fervojoj (inĝ. Lucia Fedorová) kaj pri la historio kaj evoluo de la fervojaj horarlibroj (Joachim Giessner). Ses prelegantoj prezentis pluajn sialandajn temojn: "Ruliĝantaj elektro-centraloj de Svisaj Federaciaj Fervojoj" (Ernst Glättli), "La plej nova hungara fervojlinio" (József Halász), "Modernaj informistoj por vojaĝantoj" (Ladislav Kovář), "Brunel-distingoj por Danaj Ŝtatfervojoj" (Henning Olsen), "Grandrapidaj fervojaj linioj sur Balkano" (Gvozden Sredić) kaj "Artistoj kaj fervojoj" (Jan Niemann, Danio).

En unu el la tri kunsidoj de la Faka Komisiono oni prezentis la 6-an numeron de *Fervojfakaj Kajeroj*. La ter-

minara sekcio de la Komisiono difinis kiel plej gravajn taskojn: daŭrigi la laboron por la sekva eldono de *RailLexic*; instigi ke UIC kreu la difinojn de la terminoj kaj traduki tiujn al E-o; plu kolekti fakajn esprimojn; solvi la restintajn problemojn pri fervojfakaj vortoj en la reviziata PIV. Interesaĵo: la komisiono ricevis peton de franca studentino pri materialoj por universitata disertacio titolota "Esperanto: solvo al la problemoj de terminologoj kaj tradukistoj".

Dum la plenkunsido Lucien De



Parolantoj de 13 lingvoj povas jam trovi bezonatan fervojan E-terminon en ĉi tiu verko.

Sutter (Belgio) kaj Gvozden Sredić (Jugoslavio) ricevis la distingon "honora membro de IFEF". De Sutter, ĝis nun ĉefkomitatano de IFEF, retiris sin; elektigis al tiu posteno Jean Ripoché, kun anstataŭanto Jindřich Tomášek.

Tri numerojn de kongresa kuriero redaktis Stano Marček, kiu parte disponigis ties materialojn al la retroŝta bulteno "Interredaktore".

Laŭdindas la laboro de la trivirina LKK sub prezido de inĝ. Magdaléna Feifichová, kun aro da tre kapablaj, bonvolemaj kaj laboremaj helpantoj.

La venontaj IFEF-kongresoj estos aranĝataj en Aalborg (Danio, 1998) kaj Maribor (Slovenio, 1999); por 2000 invitas provizore Rumanio.

Laŭ raportoj de István Gulyás (Hungario), Joachim Giessner (Germanio) kaj Internacia Fervojisto

Senlime, ĝis Pakistano

La lasta Trilanda Renkontiĝo (27 apr.) de la asocio Senlime, kiu kunigas e-istojn el la regiono Mozo-Rejno (Germanio kaj Beneluksaj landoj) temis pri "Esencaj aspektoj de la islama mondo".

"Senlime" intencas konatigi siajn membrojn kun mondaj religioj, speciale tiuj firme instalitaj en nia regiono. Ni komencis en aprilo 1996 per prelego pri judismo kaj vizito al la nova sinagogo en Akeno. Ĉi-jare sekvis religio kiun multaj okcidentanoj sentas la plej fremda, eble eĉ danĝera al nia socio.

Ĉar la invitita ĉefpreleganto Jamil Akhtar (Pakistano) ne povis veni, la ĉ. 50 partoprenantoj unue aŭskultis lumbildan prelegon de Claude Martins (Francio), longe laborinta kaj loĝinta en preskaŭ ĉiuj arabaj landoj. Li donis siajn impresojn precipe pri Egiptio, Sirio kaj Irako, kaj klarigis sian vidpunkton pri islamismo.

Dek tezoj pri islamismo — objektivaj aŭ falsaj — estis elektitaj por diskuto. Ekz.: "La islama fatalismo malfaciligas progreson. Kial islamismo disvastiĝas forte en Afriko kaj Usono? Ĉu islamismo edzo rajtas bati sian edzinon? Islamo estas la religio de la mezo, de la bona mezuro kaj de la saĝo." Por ricevi fakajn komentojn al niaj tezoj, ni planis viziton al la Bilal-moskeo kaj islamismo centro en Akeno. Sed fakte, iom antaŭ nia renkontiĝo, alvenis neantaŭvidite 100 ekzempleroj de broŝureto el Pakistano kun ekzakte niaj tezoj responditaj de scienculoj pri islamismo. Montriĝis ke Amjad Butt, la sekretario de Pakistana E-Asocio, leginte pri nia temo, petis de la lingvisto kaj religia scienculo Allama Muztar Abbasi (fondinto kaj ĉefgvidanto de PakEsA, UEA-delegito pri religio) koncize pritrakti niajn tezojn. Samtempe PakEsA disdonis la tezojn al aliaj scienculoj kaj eĉ igis taggazetajn raportoj pri nia renkontiĝo, kio provokis multajn reagojn de legantoj. Eĉ tutlanda televido dissendis, la 29-an de majo, intervjuon kun Abbasi pri E-o kaj pri disvastigo de islamismo

pere de ĝi. Rezulte, multaj spektintoj nun petas korespondan kurson. Ni tute ne atendis tiel foran, fortan eĥon por nia modesta renkontiĝo.

Stimulite de la broŝuraj respondoj, kiuj referencis al diversaj suraĵoj de la Korano, ni ja piediris al la Bilal-moskeo, kie bonvenigis nin Abdullah Elias kaj germana islamano, fratino Hildegard. En la moskeo ni lernis pri la esencaj principoj kaj la “ kvin kolo-
noj ” de la islama religio. Por esprimi nian dankemon, ni donacis al la centro *Nobla Korano* (araba-Esperanta).

Al interesatoj ni volonte sendos la pakistanan broŝureton kontraŭ unu respondkupono. Informojn pri islamo vi ricevos ankaŭ ĉe Universala Islama E-Asocio, Lower Mall, PK-47150 Murree, Pakistano.

Trude Sinno (Nederlando)



**Turo de la Bilal-moskeo kaj
islama centro en Akeno**

Venu al islamo

En la revuo *La ondo de Esperanto* (1997/1), la konata baŝkira Esperanto-poeto Gafur Gazizi (ul. Puŝkina 20/29-2, Salavat, Baŝkortostano, RU-453200 Ruslando) lanĉas alvokon, “ direktitan al realigo de paco en la mondo ”. Ĉar laŭ li “ ne estas juste forgesi pri la arabaj landoj ”, kie Esperanto “ ne multe prosperas ”, li vokas “ ĉiujn honestajn esperantistojn veni al la islamo — la koro de la Tria Mondo. Ni devas misie klarigi inter la muzulmanoj niajn pacajn idealojn. ”



• Alp-Adrio: Triesto plu centras

Unuafaje oficialaj instancoj de Alp-Adria Laborkomunumo aŭspiciis la tradicion, jam 9-an Alp-Adrian Esperanto-Konferencon (5-8 jun., Crikvenica, Kroatio). Dudeko da partoprenantoj aŭskultis Martin Stuppnig (Aŭstrio) pri trans-Alpa transporto, Janez Zadavec (Slovenio) pri ekologio kaj atomcentraloj, Ĝenita Zvirac (Bosnio) pri milito kaj detruo en ŝia lando, kaj Marija Belošević (Kroatio) pri ŝia vojaĝo en Albanio. Du laborgrupoj preparolis instruadon kaj Kampanjon 2000. Elektiĝis novaj komitato kaj prezidio de la Alp-Adria E-istaro. La komitaton prezidas Martin Stuppnig; ĝenerala sekretario refariĝis Edvige Tantin Ackermann. Triesta E-Asocio restos la kunordiga centro.

La 10-a Alp-Adria Konferenco okazos de la 8-a ĝis la 14-a de aprilo 1998, en Lignano Sabbiadoro, marborda loko en Friulo-Julvenetio (Italio). (*La Eta Gazeto*)

• Brazilo: Solena sesio

La parlamento de la federacia distrikto Brazilio (la distrikto de la ĉefurbo) kunvenis la 14-an de aprilo por solena sesio omaĝe al Esperanto. Ĉeestis reprezentantoj de pluraj ŝtataj E-asocioj, elstaraj movadoj kaj grupo de infanoj el la konata Lernejo Bona Espero. Salutvortojn prezentis la sesia prezidantino Lúcia Carvalho kaj kvin aliaj deputitoj, i.a. Renato Rainha, kiu iniciatis okazigi la sesion. Dankis la prezidantino kaj vicprezidanto de Brazila E-Ligo, Symilde S. Ledon resp. Francesco M. de Oliveira. (S.S. Ledon)

Je la Monda Tago de la Libro (23 apr.), E-Centro de la Universitato de Alagôas kaj la E-Asocio de tiu ŝtato ekspoziciis (22 apr.-3 majo) E-librojn kaj aliajn E-aĵojn en la centra poŝtejo de la ĉefurbo Maceió. Loka televido elsendis 3-minutan intervjuon. Nova ekspozicio samloka okazos ĉirkaŭ la Ago-Tago (4 okt.). Salutu poŝtkarte aŭ retmesaĝe: E-Centro de UFAL, C.P. 396, Maceió — AL, BR-57020-970; <amcb@dcc.ufal.br>. (Interredaktore)

• Ĉeĥio: Aliaj mondlingvoj

La E-klubo en Třebíč alprenis la nomon “Klubo de Esperanto kaj de aliaj mondlingvoj nome de Theodor Kilian”, ĉar la ekonomia situacio trudas instruadon ankaŭ de aliaj lingvoj apud Esperanto en la fama tendaro en Lančov, organizata de la klubo en Třebíč. (*Starto*)

• Ĉinio: Artikoloj pri E-verkistoj

Fu Xiaofeng, verkisto kaj membro de Tianjin E-Asocio, aperigis en ĵurnaloj plurajn artikolojn pri e-istoj, inkluzive pri verkistoj Bakin kaj Armand Su. (*Verda Haveno*)

• Eŭropo: Pasporto kaj konscio

Eŭropa pasporto por infanoj estas poŝ-granda, 12-paĝa, pole-Esperante dulingva vojaĝ-dokumento simbola, kiu tamen jam estis okaze stampita ĉe limtrapaso. Mendu ekzemplerojn de la eldonanto Zdzisław Glajcar (Skrytka 3, PL-43-400 Cieszyn, Pollando) kaj helpu lin realigi alilingvajn eldonojn, per traduko en pluajn eŭropajn lingvojn.

Pasintan jaron ĉ. 20 esperantistoj fondis en Maribor Internacian Asocion por Eŭropa Konscio (p/a Inter-Kulturo, Besednjakova 1, SI-2103 Maribor, Slovenio), cele al edukado al eŭroprnivela pensado, premisante la aplikadon de la neŭtrala internacia lingvo.

• Israelo: Informa trafo

Dank’ al la prezidanto de Junulara E-Ligo Internacia, Doron Modan, kiu kontaktis persone kaj fakte 16 amas-komunikajn instancojn, okazis en unu maja semajno, post kaj antaŭ la landa E-konferenco en Tel-Avivo, almenaŭ 5 radiaj mencioj, raportoj kaj intervjuoj pri Esperanto — i.a. ĉe la du naciaj stacioj kiujn aŭskultas la ega plejmulto de israelanoj, je tre oportunaj aŭskultohoroj.

• Kubo: Ĝemeliĝo, kun PIV

Laŭ propono de Eddy Raats el Antverpeno, kiu post sia partopreno en la Dua Kuba E-Kongreso prelegis en pluraj E-klubo de Belgio pri sia vizito, oficiale ĝemeliĝis la E-klubo de Sancti Spiritus (Kubo) kaj Verda Stelo (Antverpeno). La 26-an de aprilo, okaze de regiona E-renkontiĝo en Sancti Spiritus, Raats transdonis donacojn el Antverpeno, i.a. ekzempleron de PIV. (*Jajabo*)



La scienc-historia muzeo Carlos J. Finlay (vd. dekstre).

Ne malpli ol 35 prelegoj kaj Ronda Tablo surprogramis en la tradicia Seminario por Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko (Havano, 16-17 majo), al kiu venis ĉ. 80 partoprenantoj, sed nur unu eksterlandano. (J.L. Besada)

La muzeo Carlos J. Finlay pri la historio de medicinaj sciencoj honore uzas Esperanton kiel laborlingvon. Via vizito ĉiam estas bonvena. Adreso: Strato Cuba no. 460 % Amargara y Tte Rey, Apartado Postal 70, Habana Vieja, Habana CU-10100, Kubo; ☎+53 63 4824, 63 4841, 63 4823; ✉+53 5 37 338213, 338212; telex 511290 ACDCPCU.

• Niĝerlando: Verduloj vojaĝu

Renkontiĝo Eŭrop-Afrika de Verduloj okazos en Niamey (Niĝerlando, 31 okt. - 2 nov.). Asocion de Verduloj E-istaj reprezentos probable lokaj e-istoj, sed se vi veturos tien, anonciĝu ĉe AVE-sekretario Manfred Westermayer (Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, Germanio). (VERDire)

ANONCETO

Kiu scias pri Bolesław Musielak (foto malsupre) el Bydgoszcz, Pollando, 1937? Ĉiuj informoj bonvenaj al: s-ro J.L.F. Somogyi, 27 Glentem Way, Ferndale, W.A. 6148, Aŭstralio.



Per-sone



• Manson 90-jara

La 27-an de junio d-ro Julius J. Manson, Honora Membro de UEA, kiu ĝin longe reprezentis ĉe UN en Novjorko, festis sian 90-an naskiĝtagon.

• Ŭe: Modelo por frenezo

En la romano *Samepoka ludo* (1978) de la Nobel-premiita (1994) japana verkisto Ŭe Kenzaburo oni arestas frenezulon kiu provas sturmi la imperiestran palacon. Tiam li diras ion en lingvo nekonata. Fakte, tiuj vortoj venas el la esperantlingva poemo "Profunde mi nun spiras" de ITO Saburō. Ankaŭ la homo servinta kiel modelo de la freneza rolanto, lingvisto YAMANOI Aitarō, bonege sciopovis Esperanton. (*La Sumo Pacifika*)

• Polgár: Nov(jork)a membro

La E-parolanta ŝakĉampionino Zsuzsa Polgár — kiu nun loĝas en Novjorko — kaj ŝia edzo Jack Shutzman membriĝis en la loka E-societo. (*Novjorka Prismo*)

OFICIALA INFORMILO

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Belgio: Roger Davin.

PATRONOJ DE TEJO 1997

Britio: Ian C. Jackson. Danio: Georg Kustosz. Francio: Renée Triolle. Hungario: Flóra Szabó-Felső. Japanio: Yoriko Itō. Nederlando: E.C. Klaver. Norvegio: Margrete Landmark. Svedio: Olle Olsson.

SOCIETO ZAMENHOF 1997

Aŭstrio: Florence Cool. Belgio: Michael Cwik. Brazilo: Álvaro Rabêlo. Britio: Ian C. Jackson; Judith Jackson; Patrick E. Jackson; Robin Jackson. Francio: Jeannine Vincent. Germanio: Elisabeth Hirsch; Richard Hirsch; Oliver Walz. Japanio: Yoriko Itō. Nederlando: A.J. Bakker-ten Hagen; Hans Bakker. Norvegio: Margrete Landmark; Olav Reiersøl. Svedio: Boo Mee Kim-Lindblom; Roland Lindblom. Ukrainio: Jevhen Kovtonjuk. Usono: Alberta Seabold Casey.

DONACOJ 1997 (NLG)

ĝis la 31-a de julio

Fondaĵo Afriko: Italio: D. Trombetta 2398,80. Nederlando: Esperanto

Nederland 500,00; A.J. ten Hagen 2600,00; W.P. Roelofs 600,00. Norvegio: E. Matland 26,80. Sumo ĉi-jara 13 126,89.

Fondaĵo Ameriko: Finnlando: T. Sormunen 500,00. Nederlando: F.H. Kat 100,00; W.P. Roelofs 200,00. Sumo ĉi-jara 1931,13.

Fondaĵo Canuto: Nederlando: W.P. Roelofs 200,00. Sumo ĉi-jara 2725,07.

Ĝenerala Kaso: Francio: L. Vignaud 109,30. Nederlando: W. Bosch 50,00. Nov-Zelando: R. Harding 979,20. Sumo ĉi-jara 3272,59.

Kampanjo 2000: Japanio: Oomoto 9748,75. Nederlando: Fam. Keizer 50,00. Sumo ĉi-jara 31 552,29.

Konto Espero: Germanio: A. Hanke 20,00; R. Pflüger 67,35. Francio: R. Picou 33,30. Nederlando: W.P. Roelofs 200,00. Sumo ĉi-jara 2747,21.

Junulara Fondaĵo: Francio: M. Feneyrol 3312,56. Diversaj malgrandaj: 3,00. Sumo ĉi-jara 3520,95.

Triamonda Kongr. Fondaĵo: Nederlando: W.P. Roelofs 200,00. Sumo ĉi-jara 598,00.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: M. Meijwes 150,00. Germanio: P.W. Ruff 50,00. Sumo ĉi-jara 830,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

BEL + Fonto = movada progreso!
 Brazila Esperanto-Ligo estas la
 ekskluziva distribuanto de la
 famaj libroj eldonitaj de Fonto.

Mendu ilin ĉe:
 Brazila Esperanto-Ligo
 Cx. Postal 03625
 70084-970 Braziljo (DF), Brazilo.



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!
 UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.



Jam la Sepa Esperanta kaj Politika Semajno en Klostro Komańcza, de 29.09. ĝis 06.10.1997, Pollando, pola-slovaka-ukraina triangulo en la montaro Bieszczady. Tre aktualaj temoj, intensa lernado de la Internacia Lingvo.

Detalaj informoj: Eŭropa Esperanto-Servo, ul. Andersa 37/59A, PL-00-159 Warszawa, ☎ (022) 831-40-95, ✉ (022) 831-87-52.

INDIVIDUAJ MEMBROJ HAVAS AVANTAĜOJN

OFERTO
 Libroj kun rabato ĝis 60%!

Ekskluziva oferto de interesaj kaj valoraj libroj por ĉi-jaraj individuaj membroj de UEA: rabatoj kiuj repagas vian kotizon! Decidu mem ĉu vi deziras ricevi nur parton de via kotizo – aŭ eĉ jam tiun de 1998...

Esperanta Antologio. La plej impona kolekto de originalaj poemoj. 900p. Bindita. 60 gld. ☞ 24 gld.

Nova Esperanta krestomatio. Moderna antologio de E-literaturo. 510p. Bindita. 57 gld. ☞ 33 gld.

Faktoj kaj fantazioj. Marjorie Boulton. Renoma progresiga legolibro. 431p. 36 gld. ☞ 18 gld.

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. John Wells. 76p. 15 gld. ☞ 9 gld.

La danĝera lingvo. Ulrich Lins. Studo pri persekutoj kontraŭ Esperanto. 546p. 66 gld. ☞ 39 gld.

Studoj pri la Internacia Lingvo. En Eo/angla/franca/germana. 155p. 24 gld. ☞ 18 gld.

Ni kaj ĝi. Eseoj de Waringhien pri religio kaj arto. 346p. 45 gld. ☞ 18 gld.

Infoduktoj. Pri la komputila revolucio. 142p. 19,50 gld. ☞ 9 gld.

La arbo de la sciado. Filozofia romano de Pio Baroja. 222p. 24 gld. ☞ 12 gld.

Kantoj kaj romanoj. La famaj ampoemoj de H. Heine. 381p. 39 gld. ☞ 18 gld.

Tiu ĉi oferto validas ĝis la 31a de dec. 1997.
 Mendojn bv. adresi al la Libroservo de UEA, kun indiko de la kvantoj kaj titoloj dezirataj. Aldoniĝas sendokostoj je 10% (minimume 5 gld.) kaj, por loĝantoj en EU, imposto je 6%.

NACIA ESPERANTO MUZEO

FR - 70100 GRAY
 19 rue Victor Hugo
 Tel. 03.84.65.11.73

En 10 salonoj de publika konstruaĵo ĝi estas samtempe:
 ARKIVEJO – Dokumentejo – Biblioteko kun 6000 titoloj (libroj kaj broŝuroj) – KONSTANTA EKSPozICIO (revuoj kaj diversaj esperantaĵoj).

UNUNURA EN FRANCO

LAŬDIRE LA PLEJ EKLEKTIKA KAJ ALLOGA
 EN LA MONDO

NEPRE VIZITU ĜIN

Helpu al ĝia pliampleksigo per daŭra sendo de dokumentoj kaj ĉiuspecaj eldonaĵoj.

MALFERMO

ĉiujn merkredojn kaj sabatojn de la 15a h. ĝis la 18a h.
 aŭ interkonsente kun la Direktoro
 S-ro GEO JUNIER
 Tel. 03 84 65 11 73

“Ĉarmaj desegnaĵoj kaj intereso-
 streĉa teksto” — *Eventoj*
 “Varme rekomendas al ĉiu
 volanta informiĝi” — *Kontakto*

La Bildstria Gvido al

GENETIKO

Verkis Larry Gonick kaj Mark
 Wheelis. Tradukis Sung Ho Cho.
 1996. 216p. 22cm. Mendu ĉe
 UEA. Prezo: 27,00 gld.



Cent jaroj (1896-1996) da
 stratoj, placoj, monumentoj,
 bustoj, kulturcentroj,
 tabuloj, parkoj, pontoj,
 asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam:
 UEA. 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabe-
 loj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo:
 18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)





Blonda leporo kaj Urso brunulo

Jen bela novaĵo en la magra branĉo de nia poezio por infanoj. Kolekto de 57 poemoj de 22 poetoj, ĉio en flua kaj ofte surprize bela traduko.

Al la mondo donace

Antologio de la serba porinfana poezio
INFANLIBRO DE LA JARO 1997

Elektis kaj el la serbokroata tradukis Zlatoje Martinov. Beograd: Strategia, 1996. 80+80p. 20cm. Dulingva. Kun notoj pri la aŭtoroj. Prezo: 24,00 gld.

Triona rabato ĉe samtempa mendo de minimume 3 ekz. ĉe la Libroservo de UEA.

La vivo de d-ro L. L. Zamenhof en bildoj



128-paĝa, grandformata (A4) bildlibro, per kiu Henk Thien (fondinto de la Foto-Servo pri Zamenhof) kondukas vin tra la vivo de la iniciatinto de Esperanto. 114 nigrablankaj fotoj kaj 25 mapoj, ĉio kronologie aranĝita kaj komentita. La libro celas esti utila dokumento, el kiu oni facile povas represi la materialon aŭ utiligi ĝin alimaniere.

Prezo: 30,00 (por Eŭropa Unio 31,80) guldenoj, plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, kiu estas la sola distribuanto kaj donas trionan rabaton por ĉiu samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj.

LA PLEJ KONATA LIBRO
PRI EKA TEMPOUZO,
NUN EN ESPERANTO!

Lothar J. Seiwert:

La aboco de tempoplanado




Rotterdam: UEA, 1995. Serio *Konsilaroj por Aktivuloj*
n-ro 2. 53 p. Prezo: 7,50 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Tiu zumado ion signifas...

WINNIE-LA-PU

AN ESPERANTO VERSION OF
A. A. MILNE'S WINNIE-THE-POOH

Translated by Ivy Kellerman Reed
and Ralph A. Lewin



Illustrated by

ERNEST H. SHEPARD

Edited with an Introduction and Glossary
by Humphrey Tonkin

Reeldonita de UEA, 1992.

Tole bindita kun kromkovrilo. 27,00 gld.

MENDU DE LA LIBROSERVO DE UEA.
Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld.
Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.